# der esperantist

Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR

23. Jahrgang Nr. 145 (5/1987) ISSN 001 4-0619 30 Pf

# 11-a Kongreso de Kulturligo

En Karl-Marx-Stadt, de la 11-a ĝis 13a de junio 1987, okazis la 11-a kongreso de Kulturligo de GDR. Pli ol 1000 delegitoj kaj gastoj bilancis la laboron, kiun realigis la kulturorganizo ekde la 10-a kongreso, kiu okazis 1982 en Dresden. La moto de la kongreso tekstis „Spirita-kultura kreiveco por paco kaj socialismo". Enkonduke la delegitoj aŭskultis tri ĉefajn referaĵojn. Parolis la prezidanto de Kulturligo, prof. d-ro Hans Pischner (pišner), la prezidanto de la Akademio de Sciencoj de GDR, prof. d-ro Werner Scheler kaj la Unua Vicprezidanto kaj Ĉefsekretario de Kulturligo, prof. d-ro Karl-Heinz Schulmeister.

Prof. Pischner traktis la kontribuon de Kulturligo en la batalo por paco, prof. Scheler (šeler) aprezis la kontribuon de Kulturligo pro la scienca progreso kaj prof. Schulmeister (šulmajster) resumis la larĝan kontribuon de la organizaĵo por la evoluo de la kultura kreiveco en GDR. Sekvis pli ol 20 diskutkontribuoj, inter ili estis aparte gravaj la paroladoj de prof. Kurt Hager, membro de la politburoo de CK de USPG kaj de Hans-Joachim Hoffmann, ministro por kulturo.

Kian rolon ludis GDREA, parto de Kulturligo, dum la kongreso? Jen resume:

1. Jam antaŭ la kongreso oni publikigis intervjuon kun funkciuloj de Kulturligo en la gazetaro de GDR kaj aperigis resumajn informojn. Tie oni ankaŭ menciis Esperanton.

2. La delegitoj de la kongreso ricevis 44-paĝan priagadan raporton de la prezidio de Kulturligo pri la farita laboro. La agadon de GDREA oni menciis tie en 20 lokoj.

3. La prezidanto de GDREA, Hans Heinel, estis elektita en la kongresprezidion kaj poste reelektiĝis membro de la prezidia konsilantaro de Kulturligo.

4. En sia parolado prof. Schulmeister apreze menciis la agadon de la esperantistoj de GDR..

5. Aparte grava estas la fakto, ke prof. Kurt Hager, membro de la politburoo kaj sekretario de la Centra Komitato de Socialisma Unuiĝinta Partio de Germanio (USPG), ankaŭ menciis Esperanton kiel gravan laborkampon de Kulturligo.

6. La kongreson partoprenis entute 12 esperantistoj kiel membroj de siaj distriktaj delegitaroj. Tio ne estis multo. Sed konsiderante, ke Kulturligo entute havas 268 000 membrojn, inter tiuj nur 1 700 esperantistojn ,la nombro de 12 ne estas malbona.

7. Okaze de la kongreso estis aranĝita granda ekspozicio de poŝtmarkoj, en kies kadro Rudolf Burmeister prezentis bonegan ekspozicion „Esperanto — 100-jara". Li ricevis medalon.

8. Aparte grava estas la fakto, ke en la dokumenta libro pri Kulturligo („Kulturbund in der entwickelten sozialistischen Gesellschaft 1982 — 1986", Berlin 1987, 364 p.), kiu estis eldonita okaze de la kongreso, enestas du ĉapitroj pri GDREA. Temas pri la gvidlinioj de GDREA („Leitsätze des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR"), p. 79 — 81 kaj parto de la referaĵo de Hans Heinel, prezentita dum la IVa Centra Renkontiĝo de GDREA, la 29an de septembro 1984 en Dresden, p. 194 — 194 („Für eine höhere gesellschaftliche Wirksamkeit der Arbeit der Esperantisten", ‚por pli alta efikeco de la laboro de esperantistoj').

9. Kiel pluan rezulton oni sendube povus mencii la multajn valorajn kontaktojn kaj interparolojn, kiujn la delegitoj havis kun reprezentantoj de la pli 40 fakoj reprezitaj en Kulturligo.

Ĝenerale la eblecoj por la esperantistoj agadi konsiderinde kreskis dum la lastaj jaroj. Ni esperu, ke la fortaj impulsoj de ĉi tiu signifoplena kongreso ankaŭ stimulos la laboron de GDREA.

**Nia prezidanto, Hans Heinel, dum la 11-a Kongreso de Kulturligo, elektiĝis membro de la Prezidia Konsilantaro kaj reprezentos en ĉi tiu plej alta gvidorgano de Kulturligo de GDR la interesojn de nia Esperanto Asocio. Ni kore gratulas al nia prezidanto pro la elektiĝo.**

## 70 jaroj Oktobra Revolucio

Jubileoj ne estu memceloj, al si mem sufiĉaj. Ili ankaŭ estu memorhelpoj, stimuloj, okazoj por bilanci aŭ iniciati. Jubileoj de historiaj datoj ne efikas abstrakte, sed ĉiam konkrete en la ŝanĝiĝantaj historiaj kondiĉoj. La Granda Socialisma Oktobra Revolucio okazis antaŭ 70 jaroj. Ne nur la adeptoj de la idealoj de Lenin sed ankaŭ ties malamikoj devas agnoski, ke ĉi tiu revolucio markis novan etapon en la evoluo de la homaro. Unuan fojon dum la historio de la homaro lando komencis konstrui sociordon, kiu celas forigi la ekspluatadon de la homo pere de la homo, forigi la skurĝon de la homaro: la militon. La Oktobra Revolucio ankaŭ signifas kulminon de la unua etapo de la ĝenerala krizo de la kapitalismo, krizo, kiu nuntempe atingis nivelon de neniam antaŭe spertita profundeco kaj komplekso, por ne diri senelireco.

Post la revolucio la mondo havis novan esperon. Jes — sekvis sukcesoj kaj venkoj sur la nova vojo, sed ankaŭ ne mankis malsukcesoj kaj malvenkoj. Post 1945, lige al la frakaso de la faŝismo, la postmilitaj kondiĉoj ebligis pliampleksiĝon de la eksocialisma teritorio.

La nova espero hodiaŭ disponas pri granda potenco. Tamen – la jaro 1945 ankaŭ markis la komencon de nova etapo tre specifa: la atomepoko. Dum la lasta tempo la instruoj de la Ruĝa Oktobro aperas en nova lumo, en la lumo de nuklea radiado. La homaro kreis al si la rimedojn de la memdetruo. Se la Oktobra Revolucio ankoraŭ instruis, ke la ĉefa misio de la laborista klaso estas la forigo de la ekspluatado, kaj sekve la konstruado de nova sociordo, oni intertempe devis lerni, ke tiuj celoj ne samritme povas validi por la tuta mondo sed devas cedi al tute alia prioritato: la savo de la homaro kontraŭ memdetruiĝo.

La nuna situacio, lastatempe plej brile analizita i. a. en la raporto de Miĥail Gorbaĉov al la 27a Partia Kongreso de KPSU, postulas tute novan aliron al la internacia situacio, ĝi postulas de ĉiuj koncernitoj novan pensmanieron. Necesas inteligenta kaj civilizita dialogo pri la eblecoj finfine malarmadi, krei reciprokan konfidon inter la politikaj, militaj kaj ŝtataj grupiĝoj atingonte tiel la kondiĉojn por solvi la multajn mondajn problemojn: pura homa medio, manĝo, sano kaj klero por ĉiuj homoj, novaj internaciaj komercaj, komunikadaj kaj aliaj rilatoj, por finfine krei mondon vere homan. Esperanto povas kaj devas helpi en tio.

# La jubilea kongreso: elstara manifestacio

Nun ĝi jam estas historio, la longe atendita jubilea kongreso de Esperanto, la 72a. Oni havis esperojn kaj ankaŭ dubojn. Kiom da homoj? La kongresa programo? Ĉu eltenos la organizaj eblecoj? Ĉiukaze — ni nun scias, ke tiuj, kiuj partoprenis la kongreson, fariĝis atestantoj de la plej elstara manifestacio en la historio de Esperanto.

## La plej granda

Ĝi estis la plej granda ĝis nun: 5 946 homoj el 73 landoj venis al la jubilea kongreso en la lulilon de Esperanto, al Varsovio, de la 25a de julio ĝis 1a de aŭgusto 1987. La pola movado donis grandiozan kontribuon. Ja ne nur temas pri la Universala Kongreso. Antaŭe jam okazis aliaj kongresoj: la **fervojista** (Katowice), **medicina** (Krakovo), **instruista** (Łodz), **junulara** (Krakovo). Neniam en la historio de Esperanto kunvenis tiom da parolantoj de la Internacia Lingvo el tiom da landoj. Estis tre rimarkebla ankaŭ la fakto, ke inter ili ĉi-foje tre abundis esperantistoj el Sovetio, GDR, ĈSSR kaj aliaj landoj, sed ankaŭ el afrikaj landoj. La kongresejo, la Palaco de la Kulturo en la centro de Varsovio, estis tre taŭga. Tamen — ĝia plej granda salono nur havas lokon por 3 500 homoj. Nur relative malfrue decidiĝis, ke la inaŭguro okazu dufoje: dimanĉe antaŭ tagmeze je la 10a kaj posttagmeze je la 14a. Tio sendube malfavore influis la reprezentiĝon de la diplomatoj. La ambasadoj simple tro malfrue ricevis la invitilojn, kaj eĉ sen mencio, ke iliaj reprezentantoj povus paroli. Sed — ne gravas. La inaŭguro estis impona. Cetere, partoprenis la inaŭguron ankaŭ la kultura ataŝeeo de GDR. La Alta Protektanto de la kongreso ,la prezidanto de la pola parlamento, t. s. la marŝalo de la pola Sejm, **Roman Malinovski,** ne nur „alte protektis" sed tre aktive engaĝis sin por kaj dum la kongreso. Tio estis rimarkebla. Ni revenos al la temo. Inter la inaŭguraj surprizoj estis la fakto, ke la nepo de la iniciatinto de Esperanto kaj aliaj familianoj ĉeestis la kongreson: **d-ro Zaleski-Zamenhof.** Ne mankis salutmesaĝoj de la Ĝenerala Direktoro de UNESKO, **Amadou Mahdar M'Bow.** En la nomo de la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj salutis la direktoro de la Terminologia Fako de UN, s-ro **Nigel Cassar.** Jubilee dignan paroladon prezentis la prezidanto de UEA, **profesoro d-ro Humphrey Tonkin,** universitata rektoro.

## Cent jaroj de internacia kulturo

La kongresa temo estis eble tro unuflanka **„Esperanto — Cent jaroj de internacia kulturo".** Por Esperanto ja ne nur gravas la kulturo, sed ankaŭ scienc-teknika apliko, instruado, diverspraktika utiligo. Sed — oni decidis festi la jubileon. Kaj tio kompreneble plej bone okazos per kulturaj aranĝoj. Jes ja, la kongresanoj prave estis tre surprizitaj per la abundega kultura oferto:

— multaj kanto- kaj dancprogramoj folkloraj,
— Chopin-koncertoj en la parko Lazienki,
— naciaj artaj vesperoj.
— Kelkaj aparte por la jubileo faritaj prezentaĵoj lige al la historio kaj kulturo de Esperanto kiel la recitalo „Sopiro — laboro — espero" de **Jerzy Fornal,** „Omaĝe al nia majstro" de **Ursula Tupejka,** „Julio Baghy" kaj „Nia kara lingvo Esperanto" de Bulgara Esperanto Teatro (BET), la monodramo „Zamenhof" de **Jadwiga Gibczýnska** kaj aŭtora recitalo de la esperantlingva bardo **Jerzy Handzlik.**
— Prezentiĝis teatraĵoj. BET surscenigis „Pikniko sur batalkampo" de Arrabal kaj „La kaverno de Salamanka" de Cervantes. De la Teatr

Powszechny oni povis vidi „Feliĉa evento" de Slawomir Mrożek. La pola grupo Verda Monto prezentis „Lulkanto" de S. Becket, „La Cikonioj" de A. Sikorski kaj „Serenado" de S. Mrożek. La franca grupo Krizalido prezentis „Aminda Kretenino" de Maurey. Sed oni ankaŭ povis admiri „La trivivaĵojn de la brava soldato Ŝvejk", kiel unupersona teatrajo en la plenumo de **Miroslaw Henke. Vida Jerman** el Jugoslavio rakontis la vivon de la japana esperantistino, kiu batalis por libera Ĉinio, Verda Majo, en la formo de originala Esperanta dramo de **Spomenka Ŝtimec** „Virino, kiu flustris en uragano".

— Ne mankis pupteatraĵoj, ekz. de la pola trupo Rabcio „Kion mi diros, tion mi diros" kaj „Ruĝa ĉapeto". La bulgara ŝtata Pupteatro Vraca prezentis „La ovo". Ankaŭ menciindas la Varsovia Teatro de Pantomimo per „Maratono", la gestoj kaj movoj — ankaŭ internacia lingvo.

— La kongresano povis ĝui elstarajn kanzonajn koncertojn en Esperanto, de la kanada kantistino **Joëlle Rabu** (finfine vere elstara moderna kanzonistino en la franca tradicio), de la polo **Jerzy Handzlik** kaj la franco **Jak Le Puil.** Reprezentis siajn kantojn ankaŭ la fama kant-kaj dancensemblo de la Varsovia Politekniko kaj la esperantista ensemblo „Gento" el Płock.

— La junuloj povis rokenroli laŭ muziko de la grupoj „Persone" kaj „Amplifiki".

— La filmprogramo ĉifoje estis pliriĉa ol kutime. La fama hungara filmo kontraŭmilita „En Eŭropo ie" trovis grandan interesiĝon. Same la pri- kaj enesperanta filmo de **Roman Dobrzyński** „Esperanto". Ĉitiu filmo estas farita en 13 landoj kaj donas vivan impreson pri la multflanka praktiko kaj signifo de la 100-jara lingvo.

— Krome oni prezentis Esperante komentitan la ludfilmon „Seksmisio" de Juliusz Machulski. Videblaj ankaŭ estis kelkaj turismaj informaj filmoj.

— Kaj fine al tiu praktika kultura parto de la kongreso ankaŭ apartenis tuta aro da ekspozicioj, kiuj informis la spektantojn pri artajoj (ekz. de **Helga Plötner** el GDR), afiŝoj pri Esperanto, polaj Esperanto-filatelajoj. (La plej granda ĝis nun montrita, de **Rudolf Burmeister** el Karl-Marx-Stadt. membro de la Centra Estraro de GDREA). Krome multajn vizitintojn trovis la ekspozicio „Varsovio en la tempoj de Zamenhof", kiu estis vizitebla en la parko Lazienki. Tiom pri la praktikado de la kongresa temo.

— Sed oni ankaŭ teoriumis pri la kongrestemo per prelegoj kaj diskutoj, inter kiuj ĉefe menciindas tiuj de **Vilmos Benczik** (Hungario), **Tibor Sekelj** (Jugoslavio), **Halina Gorecka** (Soveta Unio), **Li Shijun** (Ĉinio) kaj **William Auld** (Skotlando).

## Scienco progresas

Alia elstara trajto de la kongreso estis sendube la granda oferto de altkvalitaj sciencaj prelegoj. La tradicia Internacia Kongresa Universitato kutime havas 10 prelegojn, sed en Varsovio estis 23!. Rektoro estis la konata hispana lingvisto, esperantologo kaj libroeldonanto **prof. d-ro Juan Régulo Perez** el La Laguna (Kanariaj Insuloj/Hispanio), kiu per tre pensiga kaj persontona prelego, kvazaŭ vivoresumo de esperantisto, malfermis la 40an sesion. Oni prezentis jenajn prelegojn:

— **William Auld** (Britio): La signifo de Robert Burns en la skota socia vivo

— **Vilmos Benczik** (Hungario): Evolutendencoj de la postmilita Esperanta prozo

— **Marjorie Boulton** (Britio): La Esperanta teatro

— **Marian Dobrzyński** (Pollando): Pri la kulturo de organiziĝo

— **Hans Eichhorn** (Germana DR): Psikiatrio — neebla medicina disciplino inter Kraepelin kaj Basaglia.

La neceso de nova paradigmo por psikiatriaj sciencoj

— **Rudi Hauger** (Svislando): Kiel science sintenas la scienco?

— **Sinitirô Kawamura** (Japanio): Kemio antaŭ cent jaroj, precipe pri la studoj de Emil Fischer (1852 de 1919) pri sukeroj

— **Leszek Kordylewski** (Pollando): Muskoloj — vivanta maŝino

— **Erich-Dieter Krause** (Germana DR): La evoluo de la leksiko de Esperanto kaj ĝia evoluigo

— **Ralph A. Lewin** (Usono): Praktika fikologio — la uzo de mikroskopaj algoj por homaj celoj

— **Ulrich Lins** (FR Germanio): La heredaĵo de Hector Hodler

— **Heinz Dieter Maas** (FR Germanio): Formala teorio de tradukado

— **Carmel Mallia** (Malto): La malta literaturo

— **Béla Mészáros** (Hungario): Regenerado de organoj, histoj kaj ĉeloj en la animala mondo

— **So Gilsu** (Korea Respubliko): Sana vivo, kontenta vivo, longa vivo

— **Amri Wandel** (Usono): De Kopernikus ĝis Einstein: La evoluo de moderna astronomio

— **Adomas Vaitilavičius** (Sovetunio): Kovno kaj la kovna gubernio dum la Zamenhofaj tempoj

— **Bengt-Arne Wickström** (Norvegio): Ekonomiaj teorioj pri justeco

— **A. P. M. Toon Witkam** (Nederlando): DLT — novaj eblecoj per Esperanto

— **John Wells (Britio):**
1. Lingvoj de orienta Azio
2. Lingvoj de suda Azio
3. Lingvoj de suda pacifiko
4. La strukturo de la kimra lingvo

La 10a Esperantologia Konferenco prezentis 4 prelegojn kaj donis abundan eblecon por viglegaj diskutoj. Prelegis:

— **d-ro Ulrich Lins** (FRG): „Esplori la historion de la Esperanto-movado: atingoj, problemoj, perspektivoj"

— **Mgr. Neil Salvesen** (Britio): „Nia aktuala kulturo"

— **d-ro Istvan Szerdahelyi** (Hungario) devis prezenti prelegon pri la temo „Diakrona kaj sinkrona esperantologio". Sed pro grava malsaniĝo li ne povis plenumi la promeson. Anstataŭ li pri la sama temo prelegis **d-ro John Wells** (Britio). Intertempe ni scias, ke d-ro Szerdahelyi meze de aŭgusto forpasis. [Nekrologo aperos]

— **d-ro sc. Detlev Blanke** (GDR): „Atingoj kaj problemoj de la 100-jara Esperanto kaj ĝia lingva komunuo: socipolitikaj aspektoj".

Verŝajne la plej grava atingo por la scienc-aplika kampo de Esperanto, kiun donis la kongreso, eble ne estas la menciitaj prelegoj de la du konataj aranĝoj. De granda strategia graveco estas la oficiala fondo de la „Terminologia Esperanto-Centro" (TEC) de UEA. Tiun paŝon dum kelkaj jaroj tre zorge kaj multiniciate preparis malgranda grupo de terminologoj kaj terminologie interesitoj, inter tiuj tre aktive **Wera Blanke** el GDR. Pri TEC legu en ĉi tiu kajero aliloke.

Kompreneble ne mankis la multaj fakkunvenoj de la artistoj, aŭtomobilistoj, blinduloj, etnistoj, fervojistoj, filatelistoj, filologoj, forstistoj, instruistoj, jurnalistoj, medicinistoj, poŝtistoj, verkistoj kaj aliaj.

Fortan impulson ankaŭ ricevis la espeperantista kooperativa movado, kiu dum sia 4a Internacia Kooperativa Esperanto-Konferenco, kiun partoprenis 150 kongresanoj el 16 landoj, fondis la Internacian Kooperativan Esperanto-Organizon (IKEO). La jam tradicia Tago de la Lernejo, organizita de la internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) havis la temojn „Humuro, dramo kaj informado" kaj „ILEI post la Jubilea Jaro".

**Plano Malinowski**

Dum la inaŭguro kaj lige al aliaj elpaŝoj la Alta Protektanto de la kongreso, la marŝalo de la Pola Sejmo, **Roman Malinowski,** faris tre interesan proponon, fondi en la naskiĝurbo de

L. L. Zamenhof Internacian Centron de la Esperanto-Kulturo. Pri kio do temas? La centro estu samtempe monumento al d-ro Zamenhof kaj renkontejo de la Esperanto-movado. En Bjalistoko la urba komunuma estraro jam rezervigis 4 hektarojn da teritorio. La centro estu loko por ĉiuspecaj kunvenoj, seminarioj, konferencoj kaj kursoj pri Esperanto. Ĝi povus funkcii eble samtempe kiel

— esplorfako de la bjalistoka universitato pri esperantologio kaj interlingvistiko,
— kursejo kaj konferencejo por la pola kaj la internacia Esperanto-movadoj,
— historia kaj kultura muzeo, aparte pri la unuaj jaroj de Esperanto,
— prezentejo de la Esperanto-kulturo por la ekstera publiko.

Verŝajne la plej grandan financan ŝarĝon portos la pola ŝtato. Tamen, la internacia Esperanto-movado estas alvokita finance subteni.

Estas sen dubo, ke tia centro povus tre grave akceli la Esperanto-movadon aparte en meza Eŭropo.

## Komitataj laboroj

Kiel dum ĉiu kongreso, ankaŭ ĉifoje la Komitato de UEA kaj ĝia Estraro multe laboris, ĉu plenkunside ĉu komisione. Oni diskutis kaj aprobis la jarraporton de la Estraro, alelektis al la Estraro kiel estraranon por financoj Gian Carlos Fighiera (italo loĝanta en Hispanio), aprobis la fondon de la Terminologia Esperanto-Centro de UEA, pri kies celoj antaŭ la komitato raportis **Wera Blanke**. La komitato diskutis la proponon de s-ro **Malinowski** kaj diskutis multajn specifajn rezoluciojn ligitajn al la agado de UEA.

Por ne eniri detalojn ni jam finu ĉitiun punkton. Aŭ oni devus plenigi paĝojn pri la ne ĉiam facila laboro de la gvidorgano de UEA.

## Paco

La temo paco estas intime ligita al la evoluo de la internacia Esperanto-movado. Estis bona ideo, inaŭguri dum la 70a UK 1985 en Augsburg/FRG la Tagon de Paco. Ĝi sukcese ripetiĝis 1986 en Pekino kaj ankaŭ havis diversajn aranĝojn en Varsovio. La kunordiganto denove estis la vicprezidanto de UEA, **Yosimi Umeda**. Kunveno kadre de la tago kunigis esperantistojn, kiuj havis personajn rememorojn kaj travivaĵojn pri la milito. Ili pledis por malarmado kaj postulis ankoraŭ pli konkretan porpacan aktivadon de la esperantistoj. Ankaŭ la publika kunveno de MEM servis al ĉi tiu celo, doni ankoraŭ pli konkretan kontribuon. La Kolektivo Esperantista Komunista aparte substrekis la gravecon de la malarmado, por kiu Soveta Unio donis tre gravajn impulsojn kaj proponojn.

## Multaj el GDR

Entute partoprenis pli ol 130 esperantistoj el GDR, membroj de GDREA. Ili aktive partoprenis la kongresajn aranĝojn, ĉu per diskutoj en diversaj kunvenoj, ĉu per prelegoj aŭ kiel ekspoziciantoj. Al la oficiala delegitaro de GDREA apartenis **Hans Heinel** (prezidanto), **d-ro Detlev Blanke** (sekretario) kaj **d-ro Erich-Dieter Krause.**

**Hans Heinel** salutis la kongreson, aktive partoprenis la diskuton dum la kunvenoj de la Tago de la Paco kaj la publikan MEM-kunvenon kaj kunlaboris en diversaj komisionoj de la komitato. **D-ro Krause** prelegis en la kadro de la Internacia Kongresa Universitato kaj krome partoprenis aktive la laboron de la Akademio de Esperanto. **D-ro Blanke** estis unu de la 4 prelegintoj de la esperantologia konferenco, partoprenis diversajn diskutojn kaj aktive agadis en la Komitato de UEA. La delegitaro havis kontakton kun la ambasado de GDR kaj regule informis la novaĵagentejon de GDR, kiu tre efike provizis la enlandan gazetaron (kiel poste rimarkeblis).

Sed ankaŭ necesas mencii aliajn kontribuojn. La filatela ekspozicio de **Rudolf Burmeister** kaj la prezento de portretokolekto de la pentristino **Helga Plötner** trovis grandan eĥon. **Wera Blanke** estis fakte la kunmotoro de la nove fondita TEC, kunaranĝis la

unuan konferencon de TEC kaj prezentis la laboron de la nova instanco en gazetara konferenco.

Kaj necesus mencii multajn aliajn kontribuojn de GDR-anoj.

### Kaj krome

Kaj krome estas ankoraŭ multego por mencii. Ekzemple la riĉa libroservo, la akceptoj, kiujn organizis Oomoto por la Komitato de UEA. Tre impresa estis la akcepto flanke de la Alta Protektanto. La invititoj havis impreso-riĉan travivaĵon: ili povis viziti la Sejmon kaj aŭskultis respondojn de la marŝalo al multaj demandoj.

Cetere, la prezidanto de la Pola Sejmo fariĝis membro de Pola Esperanto-Asocio ...

Oni ankaŭ ekskursis, kompreneble, en Varsovio kaj tuttage ekster ĝi. Unu ekskurso iris al Bjalistoko.

Rimarkindan laboron faris stabanoj de la Esperanto-redakcio de Radio Polonia. Ĉie intervjuantoj. La direktoro **Andrzej Pettyn** kune kun **Stano Marĉek (ČSSR)** produktis 6 numerojn de la kongresa kuriero „Informilo". Ĉu ion diri pri la organizado? Post tre akraj komplikaĵoj komence de la kongreso, aparte lige al la nekompetenta organizado de ORBIS, kiun spertis la GDR-anoj — kaj certe ne nur ili — ĉio surprize pozitive solviĝis. Bedaŭrinde ekzistis kongresanoj, kiuj nek ricevis sian pagitan kongreslibron nek la kongresinsignon.

Kaj tamen, kiel organizi tian kongreson? La malfacilaĵojn oni forgesos. Restas la pozitivaj rememoroj. Kaj ĉar oni ne scias, kie komenci por danki al la multaj polaj organizintoj kaj al la stabanoj de la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam, ili ĉiuj kune akceptu nian sinceran dankon. La kongreso portos fruktojn kaj ni laboru kun la impulsoj de la kongreso por la dua jarcento.

**D. Blanke**

### La 73a en Rotterdam

La nejubilea 73a Unitversala Kongreso de Esperanto okazos de la 23a ĝis 30a de julio 1988 en Rotterdam. Ĝi certe fariĝos malpli festa kaj estos pli labora. Gravas fiksi la vojon post la jubileo.

### TELEGRAMO DE LA ĜENERALA SEKRETARIO DE UNESKO

**Dankon, ke vi invitis min partopreni ĉi tiun historian 72-an Universalan Kongreson de Esperanto en Varsovio, kaj mi sincere bedaŭras, ke mi ne povas ĉeesti.**

**Esperanto konstante pruvis sian valoron kiel bonega perilo de interkompreniĝo inter popoloj kaj kulturoj, kaj grave kontribuas al poco en la mondo. Mianome kaj nome de Unesko mi deziras al vi ĉiun sukceson por la kongreso kaj esprimas mian esperon, ke multaj homoj en la mondo, kiuj sin dediĉas al la evoluigo de ĉi tiu lingvo, povos daŭre rikolti la frukton de siaj admirindaj strebadoj.**

**Unesko restas preta provizi helpon ene de siaj disponeblaj rimedoj kaj ripetas sian apogon por la celoj, kiuj inspiris doktoron Zamenhof krei Esperanton kaj kiuj estas paralelaj al la fonda spirito de Unesko. Bondezirojn —**

**Amadou Mahdar M'Bow.**

### Plej aktiva komitatano

Fariĝis kutimo dum la Universalaj Kongresoj anonci ĉiujare „la plej aktivan komitatanon" de la jaro. Dum la jubilea kongreso la Estraro de UEA aljuĝis tiun kvalifikon al d-ro Detlev Blanke el GDR.

### 1. Zentrales Treffen junger Esperantisten

**Der Esperanto-Verband führt vom 3. bis 6. Oktober 1988 ein erstes zentrales Treffen seiner jungen Mitglieder in Biesenthal durch. Es wird mit ca. 150 bis 200 Teilnehmern gerechnet, darunter auch ausländische Freunde.**

# Salutvortoj de s-ro Nigel Cassar, reprezentanto de la Ĝenerala Sekretario de U.N.

„Estas por mi granda plezuro esti hodiaŭ ĉi tie kun vi. Mi venas kiel parolanto por la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, kaj mi venas ankaŭ por partoprni en la Kongreso mem.

Mi volas diri, ke estas granda honoro havi tiun okazon renkonti vin, kaj ke mi volas transdoni varmajn bondezirojn de la Ĝenerala Sekretario kaj ankaŭ lian bedaŭron, ke li ne povas mem ĉeesti ĉi tiun Kongreson. Mi krome donas mian varman dankon al la Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, profesoro Tonkin, pro lia afabla invito.

La internacia lingvo Esperanto ekzistas cent jarojn. Ĉar Esperanton kreis Ludoviko Zamenhof, doktoro pola, estas aparte taŭge, ke ĉi-foje la Kongreso okazas ĉi tie, en Varsovio. Dum la pasintaj cent jaroj, milionoj da homoj lernis Esperanton kaj uzis ĝin kiel komunikilon je individua bazo. Esperanto faris multon por kunligi homojn de malsamaj fonoj, kulturoj kaj lingvoj, kaj uzante Esperanton ili transsaltis la lingvajn barojn.

En si mem Esperanto prezentas rimarkindan kulturan kaj socian fenomenon. Ĝi estas lingvo kreita je planita bazo, kaj trovas siajn originojn plejparte en latinaj, grekaj, ĝermanaj kaj aliaj fontoj. D-ro Zamenhof siatempe loĝis en regiono de Pollando en kiu kvar lingvoj estis parolataj, kaj certe tio influis lin en lia laboro establi Esperanton. De post sia kreiĝo Esperanto fariĝis valida komunikilo kaj ĉiujare aperas meznombre 200 libroj en Esperanta traduko. Mi volas mencii, ke ankaŭ la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj kaj la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj ekzistas en Esperanto.

Universala Esperanto-Asocio kaj Unuiĝintaj Nacioj ĝuas intimajn rilatojn, ĉar la Asocio estas en la listo de Ne-Registaraj Organizajoj de la Ekonomia kaj Socia Konsilio. Kaj la Asocio estas en konsultaj rilatoj kun UNESKO.

Ni ĉiuj rekonas la neceson venki la lingvajn barojn, ne nur kiel celon en si mem, sed ankaŭ kiel ilon por krei tutmondan pacon, prosperon kaj cel-unuecon. Aliflanke ni rekonas ankaŭ la neceson konservi la lingvojn, kiuj estas emblemo de kultura identeco kaj same de nacia suvereneco.

La esperantistoj perceptas la validecon de ekzistantaj vivantaj lingvoj, sed ili volas ankaŭ plibonigi la kapablon de la diversaj popoloj de la mondo interkomunikiĝi. D-ro Zamenhof klare deziris uzi Esperanton kiel helplingvon por flegi pli bonajn rilatojn inter la popoloj de la Tero. Li volis ebligi al homoj de ĉiuj rasoj, haŭtkoloroj kaj kredoj paroli unu kun la alia, interagi kaj establi amikajn interrilatojn.

En la kadro de la internacia komunumo, ni strebas konservi la pacon, limigante la nivelojn de la armiloj, ni strebas provizi manĝaĵojn kaj vestaĵojn por ĉiuj popoloj de la mondo: ni volas vidi la forigon de malsato, malsano, nescio, mizero kaj malriĉo. Multaj el tiuj celoj estas atingeblaj: ili postulas konsiderindajn fortostreĉojn, sed ili povas esti atingitaj.

La elimino de la malsano, la forigo de la malsato, la malebligo de katastrofoj kaj la posta limigo de la efikoj de katastrofoj estas niaj ĉefaj zorgoj en la organizaĵaro de Unuiĝintaj Nacioj. Tamen la forigo de konflikto, kiel same ja de la kaŭzoj de konflikto, estas la superregantaj zorgoj kaj respondecoj de la Membro-Ŝtatoj pro tio, ke ili estas unuiĝintaj en Unuiĝintaj Nacioj. Kiel organizajo, nia mesaĝo estas jena: ke per la membreco de la Membro-Ŝtatoj en la Organizajo, Unuigintaj Nacioj ĉeestas ĉie kaj tra la tuta mondo.

En la internacia komunumo, malgraŭ niaj klopodoj kaj eĉ inkluzive de la subteno de la Membro-Ŝtatoj, persistas multaj malfacilaj situacioj, kaj estas esence, ke oni interkonsentu pri taŭgaj solvoj. En Unuiĝintaj Nacioj ni estas konvinkitaj, ke per energia kaj pacienca diplomatia intertraktado oni tamen atingos solvon. La procezo de paca solvado de konfliktoj, kie ajn ili okazas, devas daŭri je ĉiu nivelo. Tiel ni certigos la estontecon por la venontaj generacioj.

Ankaŭ vi, kiel membroj de Universala Esperanto-Asocio, estas unuiĝintaj kune. Vi kunvenis el ĉiuj partoj de la mondo. Vi estas la spiritaj infanoj de D-ro Zamenhof, kaj vi parolas ĉiuj la saman lingvon. Vi povas fari multon por antaŭenigi la pacon.

En la nuna tempo Unuiĝintaj Nacioj faras elpaŝojn, kiuj metos la organizajojn en pozicion por alfronti la defiojn de la venontaj jardekoj, kaj ni kapablas fari la necesajn reĝustigojn por alfronti tiujn defiojn. Kaj estas nia kora deziro, same kiel estas la via, ke paco estu konservata kaj ke ĉiuj pac-iniciatoj estu favore sekvataj kaj utiligataj. Ĉi tiu Kongreso laboras por la plenumo de tiuj celoj kaj ni kune laboros en la afero de la paco.

Sinjoro Prezidanto, Gesinjoroj! Estas taŭga omaĝo al la memoro kaj la genio de D-ro Zamenhof, ke — post cent jaroj da uzado — troviĝas tiom da interesiĝo pri la uzo de Esperanto. Estas ankaŭ tre taŭge, ke ni estas ĉi tie en Pollando por festi tiun okazon.

### 55-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj

Al la 55-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj de la 1a ĝis la 8-a de Aŭgusto 1987 en Varsovio min sendis kiel reprezentantinon de nia lando la Asocio de Blinduloj kaj Malfortevidantoj. La asocio donis al mi akompanantinon, esperantistinon kaj transprenis la kotizon.

La kongreson ĉeestis 302 personoj el 25 landoj. La programo estis abunda, enhavis prelegojn, koncertojn, ekskursojn. Salutis nian kongreson d-ro Tonkin, la prezidanto de UEA. Venis al ni krome la redaktoro de Radio Polonia, Ardrzey Pettyn. Ni vizitis i. a. la Reĝan Kastelon en Varsovio, la naskiĝdomon de F. Chopin en Zelazowa Wola, kaj ni metis florojn sur la tombon de Zamenhof. Tie mi staris profunde emociigita, ĉar al li ni dankis la belegajn tagojn en Varsovio, kie ni pere de Esperanto senprobleme povis interkompreniĝi kun homoj el multaj landoj.

Ĝojigis nin koncertoj de la fama bulgara blindul-koruso de la E-koruso „Muzilo" kaj la monodramo sub la titolo „Sopiro, laboro, espero". Grandan signifon por mi havis, ke mi povis renkonti leteramikojn, trovi novajn kontaktojn.

En la konkurso „Mia vojo al Esperanto", kiun aranĝis la brajla E-revuo „Pola Stelo", mi akiris la trian lokon. En rezolucioj nia kongreso rekomendis, ke oni instruu Esperanton en blindullernejoj. Pri miaj impresoj dum UK kaj IKBE mi skribis artikolon por nia centra brajla revuo „Die Gegenwart". Kaj por la sonrevuo „Kultur und Freizeit" mi preparis kontribuon kun muzikaj ekzemploj.

**Ursula Heiden**

# KONGRESAJ REZOLUCIOJ

## DEKLARO DE BJALISTOKO

El la urbo Bjalistoko, naskiĝloko de la kreinto de Esperanto, Ludoviko Zamenhof, unu el la grandaj humanistaj figuroj de nia epoko, la partoprenantoj en la 72-a Universala Kongreso de Esperanto sendas tiun ĉi deklaron al la ŝtatestroj kaj registaroj de la mondo okaze de la Centjara Jubileo de la Internacia Lingvo.

1. Unu el la plej grandaj kaŭzoj de malamikeco inter la diversaj landoj de la mondo estas manko de scio. Tiuj, kiuj ne konas unu la alian, facile fariĝas viktimoj de antaŭjuĝoj kaj miskomprenoj.
2. Kvankam la edukaj sistemoj de la diversaj landoj povas multon fari por kulturi en la mensoj de siaj lernantoj informitecon kaj malfermitecon al aliaj popoloj, ankoraŭ pli valoraj ol abstraktaj lecionoj estas rektaj kontaktoj.
3. Kvankam la gazetaro kaj aliaj komunikiloj povas helpi ĉiujn civitanojn informiĝi pri aliaj popoloj, senpera komunikado inter homoj el diversaj landoj estas la plej bona maniero forigi antaŭjuĝojn kaj firmigi la kompreniĝon.
4. La senpera kontakto postulas komunan lingvon. Se homoj parolas malsamajn lingvojn, ili ne povas senpere komunikiĝi. Kvankam lernado de aliaj naciaj lingvoj estas valora maniero transponti tiun dividon, la internacia lingvo Esperanto konsistigas aparte facilan kaj efikan metodon por atingi internacian interkompreniĝon je tutmonda skalo kaj ĝi estas plej bona enkondukilo al la lingvolernado.
5. Esperanto — pro sia simpleco, logiko kaj tuta strukturo — estas ne nur lingvo taŭga por ĝenerala lernado, kiel la dua lingvo por ĉiuj, sed tra cent jaroj da utiligo en ĉiuj sferoj de la homa vivo, ĝi fariĝis plene esprimiva kaj fleksebla kaj ĝiaj parolantoj troviĝas en preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo.
6. La mondaj problemoj, kiuj bezonas pritrakton je tutmonda skalo, ĉiam pilmultiĝas. La demandoj de ekonomia evoluigo, de malarmado, de malsato, de analfabeteco, de mediprotektado, k. s. postulas komunan kaj egalecan aliron pere de rekta komunikado en komuna lingvo. Regado kaj solvado de tiuj problemoj povas efike okazi nur per plena partopreno de vicitanoj je ĉiuj niveloj.
7. Tial ni rekomendas al ŝtatestroj, registaroj kaj kompetentaj aŭtoritatoj kaj instancoj de ĉiuj landoj utiligi Esperanton kiel studobjekton en lernejoj kaj ebligi rektajn homajn interŝanĝojn inter siaj ŝtatanoj kaj homoj el aliaj landoj pere de la Internacia Lingvo.
8. Ni firme kredas, ke el tiu rekta interŝanĝo ekestos pli klara interkompreniĝo inter unuopaj homoj de ĉiuj landoj. Tio kondukos al redukto de streĉiteco, al pli granda malfermiteco inter la popoloj, kaj al pli paca kaj libera mondo.

Ni invitas ĉiujn homojn de bona volo, kiuj konsentas kun tiuj ĉi principoj, apogi tiun ĉi Deklaron kaj tiel sin dediĉi al antaŭenigo de interkompreniĝo inter ĉiuj homoj de la mondo.

**Bjalistoko, la 29-an de julio 1987**

## DUA KONGRESA REZOLUCIO:

Disvastigi la uzadon de Esperanto

La 72a Universala Kongreso de Esperanto, **okazanta** de la 25a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1987 en Varsovio kun 5 946 kongresanoj el 73 landoj,

**afirmante,** ke la Internacia Lingvo Esperanto fariĝis plenmatura komunikilo, kiu estas la libera posedaĵo de ĉiuj popoloj de la mondo,

**agnoskante** la grandan kontribuon de sennombraj uzantoj de Esperanto dum tuta jarcento por transformi la lingvon en riĉan esprimilon de plej diversaj kulturoj, inkluzive la kulturon de la Esperanto Komunumo mem,

**notante,** ke la Ĝenerala Konferenco de UNESCO rekonis la valoron de Esperanto per siaj rezolucioj de 1954 kaj 1985,

**alvokas** la Esperanto-komunumon eniri sian duan jarcenton, sekvante la daŭre validan ekzemplon de Ludoviko Zamenhof, en spirito de paco, laboremo kaj espero,

**instigas** la Esperanto-organizajojn — landajn, fakajn kaj aliajn — elserĉi komunan grundon de kunlaboro kaj pli intense interŝanĝi ideojn por antaŭenigi Esperanton,

**apelacias** al ĉiuj aktivuloj por Esperanto direkti sin al instruado kaj praktika aplikado de la lingvo.

**emfazas** la neceson pliprofesiigi la laboron por Esperanto sur ĉiuj terenoj, alprenante aktualajn metodojn, utiligante modernajn teknikilojn kaj pli efike mastrumante la disponeblajn homajn kaj financajn rimedojn,

**atentigas,** ke Esperanto estas parolata en ĉiuj partoj de la mondo kaj ke necesas adapti la organizan strukturon de la Esperanto-komunumo por plene speguli tiun tutmondecon,

**plie atentigas** pri la granda potencialo de Esperanto en la monda turismo kaj la bezono de pli multaj konkretaj agadoj sur tiu kampo,

**forte rekomendas,** ke en sia ekstera agado la Esperanto-organizajoj emfazu la Unesko-rezolucion de 1985 kaj instigu la registarajn kaj neregistarajn organizajojn, al kiuj ĝi estas direktita, plenumi ĝiajn rekomendojn, kaj

**substrekas,** ke disvastigi la uzadon de Esperanto estas konstanta tasko de la Esperanto-komunumo sub la tegmenta gvidado de Universala Esperanto-Asocio.

## TRIA KONGRESA REZOLUCIO:

Diskonigi kaj plifortigi niajn kulturajn atingojn

La 72a Universala Kongreso de Esperanto, **okazanta** en Varsovio de la 25a julio ĝis la 1a aŭgusto 1987 kun 5 946 kongresanoj el 73 landoj, kaj kun la temo „Esperanto — 100 jaroj de internacia kulturo",
**notante,** ke la Internacia Lingvo Esperanto, el sia modesta komenciĝo en Varsovio en 1887, transformiĝis en lingvan komunumon kun parolantoj en ĉiuj regionoj de la mondo;
**rimarkigante,** ke dum sia viva jarcento Esperanto faris gravan kontribuon kiel peranto de kulturaj valoroj inter la popoloj kaj subtenanto de reciproka respekto kaj interkompreniĝo inter la diversaj kulturoj de la mondo;
**atentigante** pri ĝia kontribuo al la antaŭeniĝo de la scienco kaj tekniko je internacia nivelo;
**konsiderante** ankaŭ ĝian grandan originalan literaturon, ĝian gazetaron, ĝiajn radio-programojn, kaj ĉiujn aliajn kulturajn agadojn de la Esperanto-movado;
**agnoskante** la kreskantan atenton, kiun Esperanto ricevas en universitatoj kaj esplorinstitutoj tra la mondo;
**emfazas,** ke Esperanto plene evoluos nur per konstanta plialtigo de la lingva nivelo de ĝiaj parolantoj kaj daŭra uziĝo en ĉiuj vivsferoj;
**atentigas** pri la neceso pli intense konigi la Esperanto-kulturon inter ne-parolantoj de Esperanto;
**alvokas** al pli intensaj klopodoj normigi kaj larĝi la fakan terminaron de Esperanto, tiel ke ĝi plej efike kontentigu la bezonojn de la internacia scienco kaj tekniko;
**rekomendas** al ĉiuj edukaj sciencaj institucioj, kulturaj instancoj, bibliotekoj, informcentroj kaj universitatoj, ke ili dediĉu seriozan atenton al Esperanto kaj al la rolo kiun ĝi ludis, ludas kaj ankoraŭ ludos en la monda kulturo; kaj
**konstatas,** ke, enirante sian duan jarcenton, Esperanto kaj la Esperanto-kulturo meritas la agnoskon de ĉiuj, kiuj celas la reciprokan interŝanĝon de kulturaj valoroj kaj la kreon de pli granda internaciisma sento ĉe la homoj el ĉiuj landoj.

### 21-a ILEI-konferenco

Antaŭ la jubilea UK okazis en Lodzo (Łódź) la 21-a konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, kiun partoprenis delegacioj el 15 landoj. Ekde la 17-a ĝis la 23-a de julio sub gvidado de la vicprezidanto- s-ro E. Symoens (la prezidanto de la Ligo, d-ro Szerdahelyi, pro malsano ne povis ĉeesti la konferencon), la landaj sekciestroj resp. iliaj anstataŭantoj pridiskutis la „Regularon por unueca ekzamen-sistemo", la enhavon de „Tago de la lernejo" dum la UK en Varsovio kaj problemojn koncerne la plifortigon de ILEI-sekcioj en difinitaj ŝtatoj. En plenkunsidoj estis prezentataj kvin prelegoj: „Humuro kaj skeĉoj en Esperanto-instruado" (McGill/H.). „Sugestopedio kaj Esperanto" (Bacev/BG). „Esperanto en altlernejoj kaj universitatoj de Popola Ĉinio" (Liang Ziming/RC). „Etnolingvaj influoj dum lernado de Esperanto" (Szanser/PL). „Analizo de etnolingvaj kaj esperantlingvaj konversaciaj libroj laŭ metodologia vidpunkto" (Dahlenburg/GDR).
Paralele funkciis Internacia Lerneja Semajno kaj Cseh-metoda kurso.
En ĉiuj rilatoj la konferenco estis profunde kaj zorgeme preparita fare de LKK (gvidanto: d-ro T. Ejsmont). La inaŭguron partoprenis altrangaj funkciuloj de la urbo kaj de la Łodza universitato. Aparte menciinda estas la riĉa kultura programo, prezentita de la loka esperantistaro.
Por la 22-a ILEI-konferenco estas planita la kadra temo „Tradiciaj kaj modernaj instrukonceptoj en la instruado de Esperanto". Laŭ propono de la delegito de GDR apartan lokon okupos dum la sekva konferenco la propedeŭtika aspekto en la lernado de Esperanto.
Estis aknoskite, ke la ĝisnunaj Internaciaj Metodikaj Seminarioj en Varsovio, Bad Saarow, Gárdony kaj Pisanica plenumis gravan praktikan taskon de ILEI.

**T. Dahlenburg**

## 39-a IFEF-kongreso

La ĉi-jara kongreso de la Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj okazis de la 16-a ĝis 22-a de majo 1987 en Katovice/Pollando. Partoprenis 422 fervojistoj el 20 landoj, inter ili (nur!) 4 el GDR.
La alta protektanto de al kongreso estis la pola ministro pri trafiko. La kongresprogramo enhavis multajn fakprelegojn kaj diskutojn, i. a. pri la elektrizado de fervojaj linioj, gardo de la homa medio. La partoprenintoj de GDR i. a. aktive kunlaboris en la terminologia fakkomisiono. Flanke de GDREA oficiale partoprenis Achim Meinel, membro de la Centra Estraro kaj estro de la Fakgrupo de fervojistoj.

## 5-a kongreso de ĈEA

De la 11-a ĝis 13-a de septembro 1987 en Olomouc okazis la 5-a kongreso de Ĉeha Esperanto-Asocio. Partoprenis 190 delegitoj, kiuj — post kritikaj raportoj kaj diskutoj de la lastatempa agado de ĈEA —, elektis novan ĉefan estraron. Prezidanto elektiĝis Petr Chrdle. Kiel sekretario laboros Karel Franc. Flanke de GDREA oficiale partoprenis la kongreson Hans Heinel, prezidanto, kaj d-ro Detlev Blanke, sekretario.

## Manfred Arnold — 60jara

La vicprezidanto de GDREA festis sian jubileon, la 10-an de februaro 1988. Manfred Arnold estas tre multflanka aganto de nia asocio: talenta tradukisto, kulturorganizanto, aktivulo en la distrikta estraro de GDREA en Berlin, klarvida membro de la prezidio. Li krome estas mirinde bona amatora filologo kaj estas verkanta ampleksan libron pri fremdvortoj kaj ilia pozicio en Esperanto. Ni tre kore gratulas al nia vicprezidanto kaj deziras al li estontecon plenan da sano, feliĉo kaj kreivo.

**CE de GDREA**

# VI-a IMEK

Ĉar IMEK estas vaste konata nocio, ne necesas klarigi la mallongigon. Dek jarojn post la naskiĝo de IMEK 1977 en la pola Krakovo la medicina kolegaro ree kolektiĝis ĉe ties lulilo. La nun tradicia fakaplika konferenco okazis ĝuste antaŭ la jubilea Universala Kongreso de la 20a ĝis 24a de julio 1987 en la malnova pola ĉefurbo, en urbo de grandaj artaj kaj sciencaj tradicioj. La 150 partoprenantoj venis el 16 landoj, kaj je ĝojo de ĉiuj eĉ ĉeestis pluraj gekolegoj el transmaraj landoj. La kuracistoj, stomatologoj, farmaciistoj, veterinaroj, flegistoj kaj aliaj medicinaj agantoj de multaj aliaj disciplinoj el Aŭstralio, Belgio, Bulgario, ĈSSR, Ĉinio, FRG, GDR, Hungario, Jugoslavio, Japanio, Finnlando, Nederlando, Pollando, USSR, Svedio kaj Usono travivis bone organizitan kaj glate kurintan tradicikarakteran konferencon.

Kiel reprezentanto el GDR salutis d-ro Giso Brosche nome de la 9 partoprenantoj, nome de Medicina Fakrondo kaj nome de la estraro de GDREA.

La fakaj kunsidoj okazis lunde, marde kaj ĵaŭde. La diversdisciplinaj kontribuoj kaj la interdisciplinaj diskutoj estis por ĉiuj partoprenantoj valora faka gajno, sed ankaŭ impulso por plua perfektigo de la propra lingvoscio.

Pritaksi IMEK unuavice signifas konsideri la kvaliton de la prezentitaj fakaj kontribuoj. Kvankam de IMEK al IMEK pluraj demandoj pli kaj pli estis evidentiĝintaj. Kelkaj aspektoj de la problemaro restas sen definitivaj respondoj:

1. Neniu pridubas la ĉiam kreskintan ĝeneralan lingvan nivelon. IMEK VI estis la aktuala pruvo pri tio! Ĉiu kontribuinto meritas ne nur laŭdon, sed ankaŭ dankon. La speciala lingva problemo, la stato de la medicina terminaro en Esperanto, pro la kutime popularaj eksplikoj de la temoj apenaŭ plikonsciiĝis dum nia konferenco. La problemaro tamen ekzistadas, ni diru: ĝi dormetas.

2. Daŭra demando estas la senco kaj valoro de ĉefa konferenca temo. Fakte en la ses konferencoj „regule" la plej multaj prelegintoj ne sekvis ĝin. La ĉeftemon de tiu ĉi konferenco „Sciencaj atingoj de esperantistaj medicinistoj dum la 100jara historio de Esperanto" kvazaŭ ĉiuj prelegintoj preterlasis kaj malatentis.

3. La dekjaraj spertoj instruas, ke sub niaj kondiĉoj la decido pri la ĉefa konferenca temo ne tro utilas. Ni pripensu, ĉu anstataŭe ni eble elektu konferencan devizon (sloganon), kiu esprimos nian fakan kaj humanisman kaj politikan sintenon. La faka enhavo de la prelegoj ankaŭ en tiu ĉi IMEK estis ekdiskutita. Optimumaj por la IMEK-publiko estas kompreneblaj, koncepteblaj, sed ankaŭ ĝenerale interesaj prelegoj. Tio des pli validas, se gravaj novaĵoj prezentatas.

Laŭ mia opinio tamen ne alternativas la (ĝenerale apenaŭ koncepteblaj) prelegoj. Ĝuste la altsciencaj prelegoj, ekzemple pri bazsciencaj aferoj, malabundas, kaj tial ĝuste el tio ne kreskas problemo. Ilia altnivela prezentado fakte estas lingva kompoto! Veraj problemoj ekestas kaj estadas en tio, se kelkfoje ĝenerale kompreneblaj kontribuoj ne estas tro interesaj. Ĉiu preleganto konsideru la IMEK-publikon, se temas pri pli aŭ malpli populara temo! Unuj prelegoj estas valoraj pro lingvaj konsideroj, aliaj — la plej multaj — pro fakaj konsideroj; la fake konsiderindaj gravas en la konferenco, ĉar ili kaŭzas diskutemon kaj diskutadon.

Per la moderne ekipita aŭditorio de la Pediatria Instituto la kolegaro trovis idealan konferencejon por aranĝi la kvin prelegajn kunsidojn. La 28 kontribuantoj el Bulgario, ĈSSR, Ĉinio, GDR, Hungario, Japanio, Nederlando, Pollando, Sovetunio kaj Svedio disponis pri pli ol dek horoj, t. e. pri pli ol po 25 minutojn da prelega tempo por la eksplikado de fakaj aferoj el mikrobiologio, dentkuracado, farmacio, hematologio, veterinara medicino, kirurgio, anestezo, medicinhistorio, kardiologio, psikologio, psikiatrio, imunologio, balneologio, ortopedio, biokemio kaj aliaj. Preskaŭ ĉiuj kolegoj aplikis diapozitivojn por ilustri la parolaĵojn. La plej multaj prelegoj estis tute taŭgaj por aranĝo, kia estas IMEK.

El la multaj valoraj prelegoj mi volas mencii kelkajn, kiuj ŝajnas al mi precipe taŭgaj pro la IMEK-publiko:

— Diagnozi plej diferencajn malsanojn el sekigita guteto de sanga sero — tio devus profeti vere diagnozan revolucion, aŭ tio estus tute nekredebla kaj tute suspekta afero. Tial la prelego de kolegino d-rino Margit Nagy el Hungario „Pri la manipulita seka guto kaj ties uzebleco" pere de bonkvalitaj diapozitovoj kaŭzis ne nur ĝeneralan miradon, sed ankaŭ tre viglan diskuton.

— Unu el la plej esprimivaj diapozitivserioj kunportis la japana kolego d-ro Y. Harada. Temis pri endoskopiaj intestobildoj, kies enhavon konekse kun la endoskopia tekniko brile klarigis la aŭtoro.

— La pola kolegino d-rino Maria Jackowska ilustris sian raporton pri propraj rezultoj ĉe „Loka anestezo al cezara tranĉo" per unikaj diapozitivoj kaj kapablis al ĉiuj klarigi la metodon.

— Tre ofte en nia mondo traktita temo estas la iskemia kormalsano. Kolego d-ro Lajos Molnár, Hungario, eksplikis „Riskofaktorojn kaj eblecojn de profilaktiko", kio pro la bonega lingvaĵo, pro la klareco kaj bonordeco de la prezentita faka materialo impresis.

— La ĉinaj gekolegoj ĉiam vekis la intereson de la aŭskultantoj. Ili estis elektintaj temojn, kiuj devus esti interesaj por eŭropanoj: la naskolimigo en Ĉinio, la kombino de moderna eŭropa kun la tradicia ĉina medicino, la esploroj pri la efikoj de diversaj polisakaridoj en ĉinaj kuracherboj, ekzemple en la konata ginsengo. Per granda atento la aŭditorio ankaŭ spektis la koloran videofilmon pri anestezo per akupunkturo ĉe plej gravaj operacioj; fakte ĉiuj estis tute fascinitaj.

— Jam siatempe en Schwerin kolegino d-rino Eva Ĉolakova-Boĝaĝieva estis prezentinta

bonnivelan bazsciencan prelegon. Ankaŭ en Krakovo ŝi provis tion per fiziologia-biokemia kontribuo pri la influo de hidrokortizono sur la aktivecon de enzimoj. La lingve brila prezentado estis troĝenita pere de interrompoj flanke de la kunsida prezidantino, kiu ne povis koncepti la komplikan fakan materialon kiel verŝajne la plej multaj ĉeestantoj. Tio estu malpli riproĉo al la prezidantino, sed signo de nerespondita problemo koncerne fakan prelegenhavon. Domaĝe, la gekolegoj perdis lingvan travivaĵon.

Tiuj ĉi modelaj ekzemploj — elektitaj el pluraj similaj — sufiĉu! Sed permesu al mi kelkajn informojn pri la kontribuoj de niaj samlandanoj:

Tri membroj de nia fakrondo prelegis:

— Kolegino d-rino Irmgard Bärenz, Senftenberg, rikolis laŭdon pro sia prelego „Indikoj al endoprotez-operacioj kaj postoperacia prizorgo", precipe pro la tre bone komprenebla prezentado de komplika temo per eleganta Esperanto.

— La psikologia prelego de kolego d-ro Klaus Bochmann, Bräunsdorf, „Pri kelkaj aspektoj de la kuracista-pacienta renkontiĝo en la ĝeneral-medicina praktikado" provokis grandan efikon kaj la peton flanke de pluraj kuracistoj ricevi la interesan tekston.

— La ĉifoje sola veterinara prelego estis prezentita de kolego d-ro Giso Brosche, Rückersdorf. Sub la titolo „Teniozo/cisticerkozo — ĝeneralaj kaj aktualaj konsideroj" li eksplikis — ilustrinte per diapozitivoj el la bestkuracista praktiko — higienajn problemojn de la nuntempo kaj eblojn de diagnozo, terapio kaj preventado.

Tre rimarkinda estas la ideo pri la eksperimento „prelegi" per afiŝado. Tio okazis en apuda biblioteko. Ankaŭ en sekvontaj IMEK-oj ni tion konsideru, sed anstataŭ montri la materialojn en alia domo, ni ekspoziciu en la konferencejo por garantii pli longan kaj daŭran kontakton al la publiko.

Navojo estis ekspozicio pri medicinaj aparatoj kaj instrumentoj en la konferencejo. Laŭ la nomo de la ekspozicio „Metiistoj por medicino", la organizantoj estis pretigintaj 27-paĝan katalogon Esperantan enhavanta detalajn priskribojn de la montritaj iloj.

Pli riĉa la kultura, ekskursa kaj distra programaro ne povus esti! La internacia kolegaro entreprenis aŭtobusan ekskurson al la Muzeo de Nacia Memoro en Oświęcim kaj tie omaĝis la viktimojn de la germana faŝismo metante florbukedon ĉe la Muro de la Morto en la iama koncentrejo Auschwitz.

Multaj gekolegoj partoprenis la ekskurson al la salminejo Wieliczka, kiu uzatas kiel subtera sanatorio por pacientoj kun malsanoj de la spirorganoj.

Laŭdinda estas la filatela ekspozicio en la konferencejo. Oni povis vidi temajn ekspoziciajojn pri tropikaj malsanoj, pri la historio de la Ruĝa Kruco, pri Koperniko kaj pri Esperanto. Speciala poŝta giĉeto dum unu tago en la konferencejo aplikis la oficialan porokazan IMEK-VI-stampon, kiu enhavis la portreton de Odo Bujwid, fama pola esperantisto kaj mikrobiologo, kunlaboranto de Robert Koch.

La vizito al la malnova urbo de Krakovo peris al ni neforgeseblajn impresojn. En la kadro de la urba promenado ni flaris la etoson de la farmacihistorio en la farmacia muzeo; ni admiris la centran placon kun la famaj draphaloj, la altaron de Vito Stoso kaj la kastelon Wawel. En la katedralaj katakomboj de Wawel la membroj de la GDR-grupo — konsciiĝinte pri la flegendeco de tradicioj — kolektiĝis antaŭ la tombo de Aŭgusto la Forta kaj omaĝis la signifan saksan princon. Laŭvole multaj konferencanoj aktive partoprenis aŭ ĉeestis Sanktan Meson en urba preĝejo.

Ĉiuvespere — de lundo ĝis vendredo — ni povis ĝui amuzon kaj distron en la klubejo de la studenta hejmo. La unikaj unupersonaj teatraĵoj de Jadwiga Gibczyńska, de la Estrada Ensemblo Kanea kaj de aliaj artistoj tre ravis ĉiujn. Dum la pluraj dancvesperoj estis okazo de interparolado, kompreneble ne nur de faka.

La multnombraj dankesprimoj dum la ferma kunsido al la organizintoj, antaŭ ĉiuj al Doc. d-ro Stanisław Majewski, prezidanto de OK, al magistro Włodzimierz Opoka, vicprezidanto de OK, al magistro Monika Rynkiewicz, sekretariino, kaj al magistro Wieslawa Solarz, kasistino kiel ankaŭ al la multaj nenomataj el la OK pro la preparaj penadoj dum monatoj antaŭ la konferenco kaj pro la senlacaj klopodadoj dum la konferenco esprimis la plenan kontenton de la partoprenintoj. Ni ĉiuj ne nur alproprigis tion, kion mi priskribis, ni ankaŭ ĝuis tre agrablan loĝadon kaj ankaŭ ekstraordinare variajn kaj bongustajn manĝaĝojn.

La sesa IMEK en Krakovo, Pollando, estis inda kontribuo de la medicinistoj-esperantistoj al la 100a jubileo de Esperanto.

**D-ro Giso Brosche**

## 10-a kongreso de slovakaj esperantistoj

De la 19-a ĝis 21-a de junio 1987 en Nitra/ČSSR okazis la 10-a Slovaka Esperanto-Kongreso. Partoprenis 230 delegitoj, kiuj elektis novan estraron de Slovakia Esperanto-Asocio. Oni reelektis kiel prezidanton d-ron A. Lukač. Sekretarino fariĝis Milan Zvara. Flanke de GDREA oficialaj reprezentantoj estis la membroj de la Centra Estraro, Hans-Joachim Borgwardt kaj Franz-Peter Kurtz.

## „El Popola Ĉinio" abonebla en GDR

Ekde 1. 1. 88 la fama Esperanto-revuo el Ĉinio, „El Popola Ĉinio" estos abonebla por civitanoj de GDR. La revuo aperas tre akurate 12-foje jare, po kajero kun ĉirkaŭ 60 paĝoj, ofte kun belegaj multkoloraj ilustraĵoj. La enhavo estas tre varia: informoj pri la vivo de la socialisma Ĉinio, beletraĵoj, eseoj pri Esperanto kaj ĝia movado, distraĵoj ktp. La revuo estas abonebla ĉe: Zentralvertrieb des PZV, Uebigauer Str. 4, Falkenberg/Elster 7900. Oni povas mendi ĝin nur kvaronjare. Tio signifas, se abonoj estas ricevitaj ĝis 25. 10. de jaro, oni ricevos la unuan numeron dum sekva januaro k. s. Kvaronjara abono kostos 10,50 M (do unu kajero 3,50 M). Ekde 1988 la revuo aperos en la poŝta listo de GDR. Do jen, abonu tuj!

# EL EKSTERLANDO

## Bulgario — Pisanica — V-a IMS

La Kvina Internacia Metodika Seminario okazis en nia „samideana" kursejo en la pitoreska Rodopo-montaro ekde la unua ĝis la sepa de aprilo 1987. Ĉeestis ĉirkaŭ kvindek esperantistoj-kursestroj, multaj el ili profesie laborantaj surkampe de la fremdlingvo-instruado. La programo antaŭvidis problemaron koncerne kursojn por progresintoj, kaj evidentiĝis, ke tiu ĉi temo validas kaj gravas en ĉiuj landoj, kiuj sendis interesulojn aŭ oficialajn reprezentantojn (BG, GDR, H, I, PL, S).

Estis plurfoje substrekate, ke la Esperanto-instruado ege bezonas instigojn por atingi pli altan enhavan kaj sekve ankaŭ metodikan nivelon, precipe en duagradaj resp. triagradaj kursoj.

Apartan intereson trovis kontribuoj, kiuj demonstris la praktik-eblecon de teorie bazitaj metodikaj paŝoj dum model-lecionoj.

Nia estimata bulgara metodikisto Marin Bacev sukcesplene gvidis la seminarion kaj tre lerte aranĝis la vicordon de la prezentendaj kontribuoj depende de la temo kaj samtempe konsiderinte la sinsekvon de enlandaj/eksterlandaj partoprenantoj-prelegantoj. Pere de video-kasedoj ni povis konatiĝi kun aŭd-vida Esperanto-programo „Bildoj pri Hungario", produktita de Hungara Instituto de Fremdlingvoinstruado; la kasedoj estas dediĉitaj al diversaj ĉiutagaj temoj, ili allogas la rigardantojn-aŭskultantojn per sia problemriĉa reĝisorado.

Subtenon flanke de la geĉeestintoj ankaŭ gajnis tradiciaj instruvojoj, se ili implicas kreivecon de la instruanto kaj novajn ekkonojn de la ĝenerala fremdlingvo-instruado. Ne kontentigas la ĝisnuna evoluo de t. n. programado de la Esperanto-lernado per programitaj lernolibroj aŭ per lernkomputiloj.

La estontaj IMS havos la taskon:

1. realigi paŝon post paŝo relative unuecan programon por kvalifikigo de E-kursestroj;
2. pli kaj pli envicigi en metodologiajn simpoziojn la — de nia vidpunkto — helpsciencojn (ekz. lingvistikon, literatursciencon, folkloron) por liveri al niaj lingvoinstruistoj sufiĉe da materialo, pliriĉiganta la enhavon de niaj kursoj;
3. analizi novajn Esperanto-instrumaterialojn, eldonitajn en la unuopaj landoj;
4. observi la evoluon de la ĝenerala fremdlingvo-instruado en la diversaj ŝtataj kleriginstancoj kaj — se io rekomendindas por „transfero" — apliki novajn ekkonojn por nia specifa laboro.

La VI.-a IMS okupiĝos plejparte pri kreiva apliko de diversaj lernmaterialoj flanke de la instruanto; la temo mem provokas la partoprenontojn-kontribuontojn serĉi praktikeblajn vojojn, kiuj samtempe konsideras la individuecon de la kursgvidanto kaj la supozeblajn interesojn de la lernantoj- progresintoj. Ĉu la Esperanto-Asocioj de Ĉeĥoslovakio havas la eblecon helpi al ni per organizado de tiu seminario printempe 1988?

**ti-da-p/GDR**

## Gajaj migrantoj

Preskaŭ 100 esperantistoj-migrantoj kaj naturamantoj el kvin ŝtatoj, inter ili 19 gekamaradoj el GDR, partoprenis en la perfekte organizita unusemajna renkontiĝo en Žilina. Estas menciinde, ke inter la partoprenintoj estis naŭ familioj kun unu aŭ du gefiloj.

Malgraŭ la ofte malagrabla vetero ni povis plenumi — ĉiam bonhumore — la varie planitan programon.

Okazis piedekskursoj en la belega, bizara Rokaro de Súlov — la plej malnova naturrezervejo en Slovakio en kalkoŝtona Strážov-montaro — kaj en pitoreskaj regionoj de montaro Malgranda Fatra kun fama Vrátna-valo.

Tuttaga busekskurso kun rigardado de la fascinaj, imponaj grotoj en Demänová-valo de Malgranda Tatra — glacia kaj stalaktita grotoj — faris nepriskribeblan impreson al ni ĉiuj.

Alia kulmino fariĝis bivakfajro sur montara herbejo kun rostado de lardo kaj kolbaso. Dum horoj ni tie kantis kaj kune esperantlingve — ankaŭ kanonojn — kaj en grupoj de diversaj partoprenlandoj.

La signifon de TUTA kiel ekzemplo por internacia interkomunikiĝo kaj amikeco — lige kun la centjariĝo de Esperanto — substrekis la aŭdienco ĉe la urbestraro de Žilina, en kiu partoprenis el ĉiu lando du delegitoj. Ĉeftemo estis la evoluado de novaj urboj rilate al harmonia integreco de nov- kaj malnovkonsturaĵoj.

Memkompreneble ni vespere aranĝis komunajn amuzprogramojn, ĉiam uzinte Esperanton kiel interkomprenilon.

Ĉiuj partoprenintoj samopiniis pri tio, ke la Turismaj Tagoj estis neforgesebla travivaĵo, kiu rezultigis novajn amikajn kaj kamaradajn kontaktojn inter geesperantistoj de socialismaj landoj.

La ekzemplodona engaĝo de la kolektivo de niaj slovakaj gesamideanoj kiel gastigintoj kaj organizintoj meritas nian koran dankon kaj laŭdon.

**Karl-Heinz Hering**

## Materialo serĉata

Premiojn (valorajn objektojn, E-librojn ks.) ricevos ĉiu, kiu kontribuos al kontraŭ-milita, kontraŭ-imperiisma, kontraŭ-alkoholisma kaj naturprotekta ekspozicioj (kiuj okazos en 1987 — 1988 en multevizitataj lokoj) minimume per 10 afiŝoj (neĉifitaj!) plus eventualaj bk-oj, pm-oj, insignoj, fotoj, magazinoj, pentraĵoj ktp. KONTRIBUU MEM! KONTRIBUIGU ALIULOJN! PUBLIKIGU ESPERANTE KAJ NACILINGVE! Nia adreso: Esperanto-klubo, Melnikov A. S., ab. jaŝ. 393. SU — 344007, Rostov-Don-7, USSR. (Ni pretas interŝanĝi ankaŭ aliajn ekspozicieblajn materialojn, kunligi artlernejojn ks.)

## Estona Radio en Esperanto

Estona Radio prove disaŭdigas Esperanto-programojn: Jaŭdo, 22,30 kaj dimanĉo 10,25. 290 m (1034 KHz), 49,3 m (1085 KHz). Sendu viajn rimarkojn al: Estona Radio, Esperanto-programo, SU — 200100 Tallinn, Soveta Unio.

## Vizito de IEK en '87

Dum tri semajnoj en aŭgusto mi gastis en la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica. Ĝi troviĝas en la pitoreska Rodopa montaro, apud la urbo Smoljan. Oni ofertis tri paralele funkciantajn Esperanto-kursojn, kiuj distingiĝis per diversaj gradoj de malfacileco. Kvaran gradon partoprenis aspirantoj pri la instru-rajto. Entute la kursojn vizitis ĉ. 100 bulgaroj, GDR-ano kaj japano.

Mi lernis kune kun 17 bulgaroj en klaso de la tria grado. Nia instruistino, laŭprofesie metodikistino, instruis laŭ la Cseh-metodo. Tre varia estis ŝia instruprogramo: Ni rerakontis fabelojn laŭtlegitajn fare de la instruistino, ekzercis la priskribon de bildoj, faris interparoladojn kaj eĉ enscenigis etajn skeĉojn. Krome multnombraj didaktikaj ludoj helpis al ni proksimiĝi al peresperanta pensado. Tiamaniere ĉiutage rapide pasis la tempo ĝis lecionfino. Posttagmeze ni solvis la ricevitajn hejmtaskojn aŭ promenadis en la mirige bela ĉirkaŭaĵo.

Dum la senlecionaj dimanĉoj ni ekskursis. Unua celo estis la fama feriloko Pamporovo. Alian fojon ni fariĝis atestantoj pri grandioza spektaklo de dancoj kaj kantoj en la tradicia popolmuzika festivalo de Rojen. Ni vizitis ankaŭ la modernan urbocentron de Smoljan, la tiean etnografian muzeon kaj la planetarion.

Plurfoje estis vesperaj programoj. Okazis lumbildprelego, dum kiu videblis emociigaj pentrajoj pri la nuklea inferno en Hirošima. Foje instruistino prelegis pri la historio de la planlingvoj. Bedaŭrinde ĉi tiu interesa temo estis traktata bulgarlingve. Iam nokte ni sidis ĉirkaŭ bivakfajro kaj aŭskultis la ravajn rodopajn melodiojn de sakŝalmisto. Ekzistis ankaŭ abunda ebleco por danci, ĉiutage la diskoteko funkciis ĝis noktomezo.
Dum pluraj tagoj la kanada kantistino Joëlle Rabu kun muzikistoj restadis en la kursejo. Ili donis belegan koncerton por la kursanoj. Per siaj belmelodiaj esperantlingvaj kantoj la grupeto gajnis la korojn de ĉiuj ĉeestantoj.

Iun tagon la prezidanto de BEA, Sava Dalbokov-- vizitis la kursejon. Dum kunveno li parolis pri la laboro de BEA kaj traktis demandojn kaj problemojn de la lernantoj.
Post finitaj kursoj kaj konsultadoj dum du sinsekvaj tagoj estis skriba kaj buŝa ekzamenoj. Sukcese trapasinte ilin, oni ricevis diplomon.

Dum la restado en IEK senteble pliboniĝis mia lingvorego, mi multe eksciis pri la monda Esperanto-movado kaj la historio de Esperanto en Bulgario. Pisanica, tio signifas: unika kunligo inter agrabla lernado kaj feriado, riĉa je travivajoj.

**Ulf Beling**

## La internacilingva fako

La 9-an — 11-an de aprilo 1987 en la Baŝkira ŝtata pedagogia instituto okazis la XIXa studenta resuma scienc-teoria konferenco. En la laboro de la konferenco partoprenis la fakoj de la historia, fizik-matematika, fremdlingva, natur-geografia kaj aliaj fakultatoj. Kiel fako de la fakultato de sociaj profesioj en la laboro de la konferenco partoprenis la fako de la internacia lingvo Esperanto. La fako funkcias ekde 1986 subgvide de la prezidanto de pedagogia E-klubo V. D. Gumenski. La ĉefa temo de la faka konferenco estis „La junularo de la planedo batalas por paco". Dum la prelegadoj estis lumigitaj multaj problemoj, ekzemple „Neofaŝismo en la landoj de Okcidenta Eŭropo" (prelegintino Baŝtijarova F.), „Rejkjavik: La sovetiaj pacaj iniciatoj" (Ĥurmatova G.), „La junularo de Sovetio kiel aktiva pacbatalanto" (Ibragimova F.). Inter la prelegantoj estis ankaŭ la studentinoj de la medicina instituto, kiuj faris la prelegojn subgvide de la asistanto de la farmakologia Katedro de Baŝgosmedinstitut Šigajev N. I. La konferencon ĉeestis ankaŭ la kandidato de la filologiaj sciencoj, la honora prezidanto de la Ufa E-klubo, B. G. Kolker, kiu resume notis la aktualecon de la temoj kaj la bonan informitecon de la prelegintoj.

**Gumenski V. D.**

## 10-a ĈEP

De la 23-a ĝis 29-a de majo 1987 la Vojevodia Estraro de la PEA-filio de Koŝalin invitis al la 10-a Ĉebalta Esperantista Printempo en Mielno ĉe Balta Maro. Jubileo en la jubilea jaro de Esperanto! Kaj estis rekorda partopreno! Esperantistoj el Polio (47), ĈSSR (2), GDR (10) kaj Kanado sekvis tiun ĉi alvokon.

Al la programe apartenis kurso por komencantoj kaj interesaj konversacio-kursoj, interkona vespero, danc-vespereo, vespero ĉe kampadeja fajro, adiaŭa vespero kaj belegaj lumbildprelegoj. Ni faris du ekskursojn per aŭtobuso al Bytów (Kaŝubio) kaj Koŝalin. En Bytów nin fascinis i. a. la mirinda folkloro-aranĝo de „Kaŝubia Danco- kaj Kanto-Ensemblo". En Koŝalin i. a. ni aŭdis prelegon pri komputilaj problemaj kaj provis mem solvi kelkajn taskojn en Esperanto per komputilo. Entute bunta, riĉenhava programo.

Ĉe la adiaŭo ni povis konstanti, ke ni denove trovis novajn geamikojn.

**Kurt Langer**

## Junuloj en Pisanica

Laŭ invito de Bulgara Esperantista Junularo internacian junularan seminarion en Pisanica de 28-a de septembro ĝis 4-a de oktobro 1987 partoprenis flanke de la Junulara Komisiono de GDREA Thorsten Lemke.

## Zentraler Esperanto-Fernkurs begonnen

**Ab Februar 1988 begann ein zentral gesteuerter Esperanto-Fernkurs (Korrespondenzkurs) beim Zentralvorstand des Esperanto-Verbandes. Informationen beim Zentralvorstand.**

## Erste zentrale Esperanto-Prüfung

**Am 9. Juli 1988 wird im Büro des Zentralvorstandes die erste zentrale Esperanto-Prüfung für ein Niveau abgenommen, das der Sprachkundigenprüfung I entspricht. Anmeldeschluß ist der 31. 3. 88. Informationen über die Bedingungen beim Zentralvorstand.**

## Denove en Permo

La kvina Urala konferenco pri planlingvoj okazis en la Perma ŝtata universitato Gorjkij, la 4an de aprilo. Al ĝi venis 34 esperantistoj el Permo, Sverdlovsk, Nijnij Tagil. Temoj de la ĉijaraj raportoj estis plene esperantologiaj, jen ili:

1. Kunmetitaj vortoj en Esperanto — Kuzjmenko L. P. (Nijnij Tagil);
2. Kalemburo kaj ĝia uzado en la Esperanta parolo kaj literaturo — Lozgačev N. V. (Permo);
3. Kelkaj sintaksaj specifajoj ĉe la ruslingvaj esperantofonoj — Korjenkov A. V. (Sverdlovsk);
4. Pri la tradukoj de la poemo de Lermontov „Velo" al Esperanto — Dautova R. B. (Sverdlovsk);
5. Pri unu terminologia problemo (Tipoj de esperantistaj kunvenoj) — Gorecka G. R. (Sverdlovsk).

La konferenco jam la trian fojon okazas en Permo sub la gvido de N. F. Ponomarjov, kiu emfazis la kreskintan nivelon de la raportoj. La sekva tago de la renkontiĝo estis dediĉita al la histori-esplora agado de esperantistoj. Sverdlovska etnografo-amatoro Polikarpov gvidis ĉi-koncernan seminarion kaj atentigis pri la graveco de esploroj pri la 20 — 30aj jaroj, ĉar tiuperiodajn informojn ni ankoraŭ povas akiri ĉe la vivantaj partoprenintoj de la eventoj. Jam en la dua generacio gravaj dokumentoj povas perei, kaj pli fruaj informoj praktike restas nur en arkivoj.

Ĝenerale la historiaj esploroj en Uralo lastatempe aktiviĝis. Ekzemple, permaj esperantistoj antaŭ nelonge remalkovris por si la nomon de Herman Frank, SATano, organizinto de la koresponda fako en la regiona jurnalo „Zvezda" („Stelo") en la 20aj jaroj. La korespondo efektiviĝis pere de Esperanto. En ĝi aktive partoprenis la germanaj laboristoj. Nun la tradicio estas restarigita laŭ la iniciato de nia klubano A. Mikišev en la junulara jurnalo „Molodaja gvardija" („Juna gvardio"). Jam estis efektivigita „gazetponto de amikeco" kun Pollando en la formo de demandoj-respondoj.

La renkontiĝo montris la viglan kaj multflankan agadon de la uralaj esperantistoj.

**Nikolaj Lozgačev**

## XV-a SIS en Varsovio

Inter la 29a de aprilo kaj la 3a de majo 1987 okazis la XV-a Scienca Interlingvistika Simpozio en Nadarzyn apud Varsovio. Tiu nun jam tradicia aranĝo, organizita de la Akademia Centro Interlingvistika ĉiujare kunvenigas interlingvistojn kaj interlingvistike interesitojn por diskuti kaj analizi diversajn aspektojn de la monda lingvoproblemo kun ĉefa priatento de Esperanto. En la centro de la ĉi-jara SIS staris la du subtemoj: 1) Etnolingvaj influoj al Esperanto kaj 2) Kulturaj kaj socipolitikaj influoj al la Esperantomovado. Partoprenis (kvankam en tiu ĉi jaro similaj seminarioj abundas pro la 100-jara jubileo) ĉ. 25 personoj el Bulgario, GDR, Hungario, Nederlando, Okcidenta Berlino kaj Pollando. Per plejparte tre altnivelaj prelegoj aŭ komunikoj kaj viglaj diskutoj ili kontribuis al fruktodona interŝanĝo de opinioj kaj spertoj pri aktualaj espektoj de internacia lingva komunikado. La riĉan sciencan programon konsistigis jenaj prelegoj:

— Sugestopedio — MARIN BACEV (Bulgario)
— 100 jaroj de esperantista solidareco — ZOFIA BANET-FORNALOWA (Pollando)
— La lingva ekonomio en Esperanto kiel karakteriza specifajo de la internacia lingvo — STANISLAW DUCZMAL (Pollando)
— Sociologio de Esperanto-Movado — TADEUSZ EJSMONT (Pollando)
— Ĉu hung-speranto — nacilingvaj influoj en Esperanto-literaturo — ISTVAN ERTL (Hungario)
— Ĉu migra aŭ norvega rato? (Pri propraj nomoj kiel elementoj en fakvortoj) — SABINE FIEDLER (GDR)
— Pri la uzado de citiloj en Esperanto — SABINE FIEDLER (GDR)
— Pri neevitebla venko de Esperanto — ANTONI GOLONKA (Pollando)
— Pri mitoj en la Esperantomovado — ANTONI GOLONKA (Pollando)
— Originala porinfana Esperanto-literaturo — ESPERANTINA MIRSKA (Pollando)
— Problemoj de etnolingvaj influoj al Esperanto — TADEUSZ POBOŹNIAK (Pollando)
— Esperantio kiel sekundara helpsocio — SANDOR REVES (Hungario)
— Plurformismo en Esperanto — RYSZARD ROKICKY (Pollando)
— Priskriba kaj preskriba faktoroj en esperantologio — RYSZARD ROKICKY (Pollando)
— Lingvaj eraroj pro kelkaj gramatikaj kategorioj neidentaj en Esperanto — IRENA SZANSZER (Pollando)
— La proporcioj de la stomatologiaj vortoj en la gravaj vortaroj — BALLASZ SZEMÖK (Hungario)
— Kontrasta sintakso en D.L.T. — DORINE TAMIS (Nederlando)
— Aŭtomata tradukado — HERMANN TAUTORAT (Okcidenta Berlino)
— Interna mondo de la prozo — WOJCIECH USAKIEWICZ (Pollando)

Kulmino inter la vesperaj okazigoj estis teatra aranĝo. JERZY FORNAL, aktoro de la Nacia Teatro en Varsovio, kortuŝe prezentis per „Aniaro" de Harry Martinson (tradukita de W. Auld) teruran vizion pri estonteco post nuklea milito. Tiamaniere la partoprenantoj de SIS 87 havis eblecon rigardi premieron de altnivela teatraĵo, kiun oni intencas surscenigi dum la Universala Kongreso.

Dezirinda estas baldaŭa publikigo de la plej valoraj prelegoj dum SIS 87 en plua volumo de Acta Interlingvistika, por informi pli grandan rondon da interesitoj pri la interlingvistika problemaro.

**Sabine Fiedler**

# Interlingvistika seminario en Slovakio

Dum la lasta tempo oni povis observi en Slovakio ĝojigajn aktivecojn rilate al interlingvistiko. Menciindas la seminarioj en Nitra, kiuj okazis dum la lastaj jaroj. Kiel materialkolektoj de tiuj lingvaj/lingvistikaj seminarioj aperis la serio „Kontribuo al lingvaj teorio kaj praktiko", redaktiva de d-ro Stanislav Košecky. Ĝis nun aperis 4 volumoj kun tre interesa enhavo. Krome oni povas noti la fakton, ke en kelkaj slovakaj lingvistikaj verkoj oni ankaŭ donis atenton — pli aŭ malpli objektivan — al la problemo de internaciaj planlingvoj.

Nova ŝtupo de interlingvistikaj klopodoj estas la unua scienca seminario pri interlingvistikaj problemoj en Slovakio, kiu okazis de 20. — 24. 5. 1987 en Tatranska Lomnica (Altaj Tatroj).

Slovakia Esperanto-Asocio kaj Ĉeha Esperanto-Asocio invitis lingvistojn, interlingvistojn kaj kelkajn funkciulojn de la asocioj. Sekvis la inviton i. a. du famaj slovakaj lingvosciencistoj, nome prof. d-ro sc. Ján Horecký kaj prof. d-ro sc. Jozef Mistrík. Prelegintoj el la eksterlando estis d-roj Erich-Dieter Krause, Detlev Blanke (el GDR) Tadeusz Ejsmont (Pollando) kaj Wera Blanke (GDR).

La seminario sekvis en kelkaj aspektoj la modelon de la interlingvistikaj seminarioj de Ahrenshoop (GDR). Malfacilaĵo estis la neceso, traduki la esperantlingvajn prelegojn por 7 slovakaj lingvistoj kaj la slovakajn aŭ ĉeĥajn prelegojn esperanten por la eksterlandaj prelegantoj. Sed ĉi tiun taskon tre bone solvis la tradukintoj.

La prelegojn listigotajn sube sekvis tre interesaj diskutoj, utilaj por la lingvistoj kaj interlingvistoj. Sendube ripetiĝis multaj konataj antaŭjuĝoj. Sed oni ankaŭ montris vere seriozajn problemojn, kiujn la interlingvistiko kaj esperantologio ankoraŭ ne povas respondi kontentige.

La seminarion entute partoprenis 25 personoj. Ĝi eventuale povas havi ekpuŝan funkcion por pluraj seriozaj interlingvistikaj aktivecoj en Ĉeĥoslovakio, kvankam ŝajne — almenaŭ nuntempe — la kondiĉoj en Slovakio eble estas pli favoraj.

Jen la listo de la prelegoj (laŭ la prezentosekvo):

— Pri la objekto kaj nuna stato de interlingvistiko (d-ro sc. Detlev Blanke)
— Lingvaj problemoj en internaciaj fakaj renkontiĝoj (doc. d-ro Vlastimil Novobilský CSc, pedagogia fakultato Ústi nad Labem)
— Lingva konstruaĵo por komuna komunikado (d-ro Sáva Heřman, CSc, universitato Praha, filozofia fakultato)
— La rilato inter la lingvo kaj lingva komunumo en etnaj kaj planaj lingvoj (prof. d-ro Ján Horecký, Dr. sc., Lingvoscienca Instituto de la Slovakia Akademio de Sciencoj Bratislava)
— Esperanto kaj paralingvistiko (prof. d-ro Jozef Mistrík, Dr. sc., filozofia fakultato de la universitato Bratislava)
— Prozodiaj ecoj en funkciado de internaciaj etnaj kaj planaj lingvoj (d-ro Slavo Ondrejovič, CSc, Lingvoscienca Instituto de la Slovakia Akademio de Sciencoj, Bratislava)
— Klasifikado de morfemoj en Esperanto kaj en etnaj lingvoj (d-ro Erich Spitz, CSc, Minej-Altlernejo Ostrava)
— La evoluo de la leksiko de Esperanto kaj ĝia evoluigo (d-ro Erich-Dieter Krause, Karl-Marx-Universitato Leipzig)
— Apliko de la internacia lingvo Esperanto en scienco kaj tekniko (doc. d-ro Vlastimil Novobilský CSc.)
— Planlingvaj radikoj de internacia terminologia normigo kaj ties reefiko sur Esperanton (Wera Blanke, Terminologia Esperanta Sekcio de UEA, Berlin)
— Nova internacia lingva ordo (d-ro Tadeusz Ejsmont, Pola Akademio de Sciencoj, Varsovio)
— Komparo inter la afiksaj sistemoj de Esperanto kaj la bahasa indonesia (d-ro Erich-Dieter Krause)
— Maŝintradukado kaj interna pontolingvo (doc. d-ro Petr Sgall, Dr. sc. / d-ro Karel Oliva, Matematik-fizika fakultato de universitato de Praha)
— Utiligo de Esperanto en informaj komunikaj retoj (inĝ. Jan Pospíšil, Scienc-Teknika Sekcio de ČEA)
— Esperanto kiel helplingvo (prof. d-ro Vladimír Skaličká, Dr. sc., emerito)
— Metalingva funkcio de Esperanto (d-ro Pavel Žigo CSc., Filozofia fakultato de universitato en Bratislava)
— Pri la perspektivoj de la unueca tutmonda geografia nomenklaturo en Esperanto (d-ro Slavomír Utěšený, CSc., Instituto por la ĉeha lingvo, universitato de Praha)

Ankaŭ oni disvastigis la jam konatan tekston de la verko „Jes, Esperanto estas vera lingvo" de doc. d-ro Istvan Szerdahelyi, kiu ne ĉeestis.

Krom tio la lingvistoj (sen traduko) aŭskultis perlegon de D. Blanke pri Ĉinio kaj la 71a Universala Kongreso de Esperanto.
La seminario sendube, el organiza vidpunkto estis pli komplika ol la seminario en Ahrenshoop, ĉar oni devis traduki.

Sed la avantaĝo certe estis, ke la lingvistoj ne nur diskutis pri interlingvistikaj kaj esperantologiaj problemoj sed ankaŭ aŭdis la vive funkciantan lingvon. Aparte menciindas la granda kaj bona laboro de la tradukintoj d-rino Vera Barandovská, inĝ. Jan Werner, Eduard Tvarožek kaj s-ro Vondroušek.

Espereble la seminario havos sekvojn kaj stimulos seriozajn interlingvistikajn aktivecojn en ČSSR. La seminario sendube estis tre esperiga komenco.

Fine, sed ne laste, estu menciite, ke la preparon realigis preskaŭ sole d-ro Stanislav Košecky el Bratislava, kiu eldonis ĉiujn tezojn de la prelegintoj, tradukis ilin en la slovakan (respektive Esperantan), preparis fakliteraturan ekspozicion kaj solvis multegajn organizajn problemojn.

**D. Blanke**




## Nova popularscienca periodajo

En Esperantujo malmultas gazetoj, periodaĵoj, kiuj okupiĝas unuavice ne pri la Esperanto-movado, sed utiligas la lingvon kaj movadon por informi pri aliaj temoj. Apenaŭ ekzistas Esperantlingvaj periodaĵoj, kiuj celus kaj iagrade eĉ kapablus konkurenci — se ne kvante, tiam almenaŭ kvalite — kun la nacilingvaj amaskomunikiloj. Sajnas, tamen ke ĝuste tion celas la redaktoroj de „Fokuso", nova kvaronjara popular-scienca periodaĵo de Hungara Esperanto-Asocio.

Juĝante jam laŭ la unua numero, ĝi ne estas popular-scienca laŭ la kutima senco. Ĝi ne konatiĝas pli-malpli hazarde elektitajn sciencajn fenomenojn (kvankam ankaŭ tio povus esti interesa), sed klopodas informi pri aktualaj aferoj, rekte koncernantaj la vivon de homoj.

„Fokuso" estas nekutima periodaĵo (kompare kun similtipaj nacilingvaj revuoj) ankaŭ pro tio, ke ĝi strebas aperigi laŭeble multajn artikolojn pri lingve izolitaj kaj malgrandaj (laŭ areo kaj nombro de laĝantoj) landoj. „Fokuso" celas la vastan publikon ankaŭ per sia stilo: la lingvaĵo ne estas tre faka, kaj la tekstoj estas facile kompreneblaj ankaŭ por legantoj kun ĝenerala klereco, sen specialaj fakkonoj. La „digesteblon" helpas la multnombraj karikaturoj kaj aliaj ilustraĵoj.

„Fokuso" estas „posteulo" de la periodaĵo „Internacia Komputado". Tion montras ankaŭ la temaro de la unua numero (76-paĝa) de „Fokuso". Pluraj artikoloj traktas la historion kaj nunan situacion de mikroelektroniko kaj mikrokomputiloj, dum kelkaj aliaj priskribas komputilajn programojn (interalie la enkomputiligitan version de la „Fundamento de Esperanto" de Zamenhof). Oni povas legi ankaŭ pri sciencaj parkoj („katalizantoj de la evoluo") en diversaj landoj. En tiu ĉi numero la pliampleksigon de la temaro — kompare kun „Internacia Komputado" — reprezentas la rubrikoj pri ekonomiko kaj psikiatrio. Artikolo de hungara ekonomikistino analizas la „kaŝitan ekonomion", t. e. la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de la neregistritaj enspezoj de la loĝantaro. En aliaj artikoloj estas priskribita nova tendenco en psikiatrio („dinamika psikiatrio") kun konkretaj praktikaj ekzemploj, kaj specifa — kaj sukcesa — eksperimento koncerne la edukadon de mense malsanaj infanoj.
La dua numero de „Fokuso" laŭ la planoj enhavos artikolon pri robotoj, pri novaj atingoj en la diagnozo kaj kuracado de kancero, pri la internacia ŝuldokrizo el specifa vidpunkto, pri la agad-metodoj de la plej elstaraj entreprenoj de la mondo, pri novaj eksperimentoj en pedagogio, pri mistera fizika fenomeno (por kies solvo la aŭtoro petas la helpon de la legantoj) kaj aliaj temoj.
La prezo de „Fokuso" estas la sama kiel tiu de „Internacia Komputado". (Ekzemple, ĉe UEA kvar numeroj — t. e. unu jarkolekto — estas mendeblaj por 24 ned. guldenoj.) Ankaŭ la reto de perantoj restis la sama.
La novan periodaĵon prizorgas la Komputista kaj Ekonomikista Grupoj de HEA. La responeeca redaktoro estas d-ro Broczkó Péter kaj la redaktoro Lukács András.
La adreso de la redakcio estas: Fokuso, Esperanto-centro, Budapest, Pf. 193, H—1368. La revuo estas abonebla en GDR ĉe Michael Behr, Koburger Str. 83, Markkleeberg. 7113. Ĝi kostas 24 markojn, kiuj sendendas al la poŝtĉeka konto 8499-54-36851 kun mencio de la menciita peranto kaj adreso. Krome sendu poŝtkarton kun informo pri via pago. Ankoraŭ eblas aboni por 1987 kaj 1988.

## Aperis GDR-Paco '87

Jen kelkaj interesaj kontribuoj el la 40-paĝa kajero.
— Psikologia militado
— La diablaj rifoj de SDI
— Kuracistoj kaj nuklea minaco
— La armadelspezoj de la mondo
— Vivaj radiomezuriloj
— Ses paragrafoj por nova pensado
— Ĉernobil kaj la pacmovado
— Enigmoj de Antikveco
— Berlin
— La vivo de la juda paroko en Berlin
— La influo de la hugenotoj je la evoluo de Berlin
— La Berlinaj esperantistoj kaj la 750jariĝo de Berlin
— Geedzoj rakontas spritajon (Tucholsky)
— Pri traduka arto
— La disputo pri la Zamenhofa heredaĵo
— Puŝkin, Zamenhof kaj nia epoko

## GDR-Paco '87 por la abonintoj

GDR-civitanoj, kiuj oficiale abonas Pacon pere de la poŝto, senpage rivevos la jus aperintan numeron '87, laŭ peto al GDREA.

## La redakcio petas pardonon

pro la terura malfruiĝo de „der esperantist". Laŭ informoj de la presejo la koncerna kompostisto malsanis pli ol 1 monaton kaj nun klopodas regajni la ritmon. En la presejo troviĝas la manuskriptoj de 3 pluaj kajeroj.

## Malmulte promesas — multe plenumas

**INFANPSIKOLOGIO — elektitaj temoj, de Margrete Landmark. Liége, SUK[1]), 1978. 188 p.**

Sub la modesta titolo „Infanpsikologio" sin kaŝas ampleksa verko pri multfaceta temaro. En naŭ ĉefaj ĉapitroj la norvega psikologino peras interesajn detalojn pri la hereda bazo, la komenco de persona vivo, la infano kiel socia kunulo, familiaj rilatoj kaj senhejmaj infanoj, teoriaj problemoj de psikologio, psikanalizaj instigoj por infanpsikologio, la kontribuoj de aliaj pensosistemoj, la grava rolo de infanaj ludoj kaj psikananlizaj, socihistoriaj kaj aliaj teorioj pri ludado.

La skolo de Freud kaj liaj posteuloj pretendas plej gravan spacon, sed ankaŭ behaviorismo (Skinner, Bandura k. a.), epistemologio de Piaget, socihistoria teorio de Vigotski, multaj aliaj psikologiaj pensmanieroj kaj influoj el najbaraj fakoj (genetiko, biologio, medicino, etologio k. a.) estas konsideritaj.

Fakaj tekstoj en E. ankoraŭ estas raraj, precipe pri psikologio kaj limfakoj. Des pli gravas la 15 titoloj, kiujn la aŭtorino mencias en sia bibliografio: ili plejparte eldoniĝis en la sepdekaj jaroj, prefere kiel multobligitaj prelegotekstoj de SUK (Someraj Universitataj Kursoj en Liége, Belgio). Ĉi tiun vicon de bazaj prelegoj la aŭtorino riĉigas per facile legebla enkonduko en la amplekan temon.

Ĉiuj, kiuj okupiĝas pri infanoj aŭ interesiĝas pri elformiĝo de homa personeco en daŭra interagado kun socia medio, legos kun gajno la 188paĝan kajeron. Kiel diverscela labormaterialo ĝi rekomendindas jam sole pro la zorgeme preparita indeksaro. Temoj kaj nomoj estas aparte listigitaj; al la 167-titola bibliografio aparte aldoniĝas 12 libroj „por memstudado". La aŭtorino mem bedaŭras (en antaŭparolo), ke pro manko de tradukoj, speciale el la rusa, ŝi ĉerpas „ĉefe el Okcident-Eŭropaj kaj Usonaj fontoj kaj uzas malmultajn studojn de Orient-Eŭropaj aŭtoroj"; tamen 10 el ĉiuj menciitaj materialoj devenas el socialismaj landoj.

En la glosaro (cetere: jam bona, tre utila kutimo ĉe SUK kaj KCE[2]) !) Landmark klarigas kelkajn terminojn, kiuj ne troviĝas en PIV aŭ tie ne estas kontentige difinitaj. Inter ili pluraj neologismoj, kiuj al mi ŝajnas taŭgaj, eĉ nemalhaveblaj (ataĉo, fostro-, gepatro, patrinato). Kaj fina, marĝena rimarko: al mi plaĉas, ke la aŭtorino evitas la mallertan „li/ŝi" (kiu ofte necesus en teksto pri infano!) kaj ne anstataŭas la duoblan pronomon per „ĝi" (ĉar infano — eĉ bebo — ja havas seksson!). Ŝi kuraĝas uzi „triapersonan pronomon komunan al ambaŭ seksoj". Sed: ĉu „zi" (propono de Jonathan Pool) estas la plej bona solvo — tion verŝajne nur montros la estonto!

[1]) SUK = Someroj Universitatoj Kursoj
[2]) KCE = Kultura Centro Esperanto, Svisio

**D. Blanke**

## 1-a plenkunsido de la nova estraro

Sian unuan plenkunsidon post la novelektoj okazigis la Centra Estraro de GDREA la 17an de septembro 1987 en la distrikta urbo Suhl. Sur la tagordo estis raportoj kaj diskutoj pri la 11a Kongreso de Kulturligo, la IVa Centra Konferenco de GDREA, la 20a Konsultiĝo de Esperanto-asocioj de socialismaj landoj, la 72a UK kaj aliaj jubileaj kongresoj en Pollando. Krom tio oni traktis dum la kunsido pri la agado de GDREA dum la jaro 1988, kiu donos apartan atenton al la junularo.

Valoras krome mencii, ke salutis la aranĝon la 1a distrikta sekretario de Kulturligo, d-ro Jochen Witter. Komence de la plenkunsido la partoprenantoj povis rigardi la polan-bulgaran filmon „Esperanto" en Esperanto (per video-bendo). Vespere la muzika pedagogo Rolf Deke el Dresden prezentis ege interesan programon pri muziko per komputiloj, kiuj kapablas imiti grandegan nombron de naturaj instrumentoj.

## Aboneblaj Esperanto-gazetoj en GDR

Kompletigante la superrigardon pri en GDR aboneblaj Esperanto-gazetoj, kiu aperis en „der esperantist" 143 (3/87), p. 63, ni aldonas:

— „Fokuso", aperas 4foje jare, 100-paĝaj kajeroj pri scienco, tekniko, socio, eduko, ekonomio, naturo, medio. Formato A5. Aperas en Hungario. Jarabono: 24 markoj ĉe Michael Behr, Koburger Str. 83, Markkleeberg 7113. La numeroj por 1987 ankoraŭ mendeblaj.

— „Interligilo", organo de la Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocio, aperas 4-foje jare en Bulgario, 20 paĝaj kajeroj, A4, abonebla ĉe Hannelore Bünger, Fährstr. 1, Pirna 8300.

— „Filologo", organo de la Internacia Unuiĝo de la Esperantistoj-Filologoj, 4 kajeroj jare, 16 paĝoj, A4. Aboneble pere de GDREA, de kie oni petu informojn.

## Nova grupo en Rathenow

Post longa interrompo en la urbo Rathenow denove fondiĝis Esperanto-grupo la 21-an de aprilo 1987. La prezidantino de la grupo estas Helga Thomas.

## Nova distrikta informilo: Novaĵoj el Halle

La Distrikta Estraro de GDREA Halle eldonadas novan informilon. „Novaĵoj el Halle" aperas jare per ses 8-paĝaj numeroj (A5) kaj estas redaktata preskaŭ ekskluzive en la germana lingvo. Per tio ĝi povas fariĝi utila informilo pri Esperanto kaj la agado de GDREA por la neesperantista publiko. La redaktoro estas Peter Bartos. Abono kostas 3 markojn. Abonojn akceptas: Kulturbund der DDR, Esperanto-Verband, Bezirksvorstand Halle, PSF 161, Halle, 4010.

# La 10-a renkontiĝo: jubilea!

Jam dum unu jardeko ĉiujare renkontiĝas en GDR la iamaj membroj de la Germana Laborista Esperantista Asocio (LEA). Ĉi-jare 42 veteranoj kunvenis de la 7-a ĝis 9-a de majo 1987 al sia 10-a, do jam jubilea, renkontiĝo en Neustrelitz (norda GDR). La renkontiĝo okazis en la inĝeniera faklernejo por konstruado, kies direktoro, d-ro Mewes, tre helpis en la preparlaboroj kaj havas grandan meriton pri la bonega sukceso de la renkontiĝo. Jaŭde vespere, post la bonvenigo flanke de d-ro Mewes kaj la vicprezidanto de GDREA, Rudolf Hahlbohm, la partoprenintoj povis aŭskulti prelegon pri Neustrelitz kun diapozitivoj, prezentitan de s-ro Balz.
Vendrede, post la malfermo, oni rememoris intertempe forpasintajn kamaradojn. Sekvis distingo de Johannes Dittrich el Roßwein per la Honora Insigno de GDREA. La unua sekretario en Neubrandenburg salutis la renkontiĝon elstariginte la multflankecon de la esperantista agado.
Werner Plate prelegis pri la laborista Esperanto-movado en la norda regiono Mecklenburg (pronocu meklenburg) kaj aparte omaĝis al la unua prezidinto de la iama Centra Laborrondo Esperanto, Rudi Graetz, kiu ĉijare estus fariĝinta 80-jara kaj mortis antaŭ 10 jaroj.
Achim Zettier prelegis pri la kontinueco inter pasinteco kaj nuntempo de la agado de esperantistoj en Prenzlau kaj Werner Habicht pri la historio de la LEA-grupo en Waltershausen dum la 20-aj jaroj. Pri la temo „750 jaroj Berlin" prelegis Rudolf Hahlbohm.
Posttagmeze la partoprenintoj de la LEA-renkontiĝo busekskursis al la memorejo Ravensbrück, iama koncentrejo. Urbekskurso tra Neustrelitz finis la renkontiĝon.
(laŭ notoj de A. Zettier)

## „Die Weltbühne" pri DLT

En la n-ro 22/1987 de la reputacia semajna magazino de GDR „Die Weltbühne" aperis ampleksa artikolo de Ralf Klingsieck pri DLT, la konata duonaŭtomata traduksistemo, en kiu Esperanto ludas la rolon de la maŝina lingvo. (Pri tiu projekto ni publikigos detalan materialon en unu el la sekvaj numeroj.) La artikolo havis la titolon „Sprach-Computer aus den Niederlanden".

## Diskuto kun tradukistoj

La 27an de majo 1987 la distrikta estraro en Leipzig de la societo de tradukistoj de GDR invitis d-rojn Krause kaj Blanke al diskuto pri la temo „Esperanto — jam konkurenco por la tradukistoj?"
La du enkondukajn prelegojn sekvis tre vigla diskuto, kiu flanke de la tradukistoj tute ne montris ian konkurenctimon antaŭ Esperanto. Valorus organizi similajn prelegojn ankaŭ en aliaj distriktoj.

## Jubilea SEFT

Ĉi-jare nur jubileoj! Ankaŭ la Somera Esperantista Familia Tendaro (SEFT) okazis la 10-an fojon. Partoprenis 59 personoj, inter ili 2 poloj.
Kiel kutime dum SEFT oni multe ekskursis, kolektis fungojn, aŭskultis prelegojn aŭ (la infanoj) fabelojn. Pro la malbona pluva vetero, kiu cetere ne malhelpis bonegan etoson ,multaj anoncitaj partoprenontoj ne alveturis. Sendube la 11-a okazos, 1988 — kaj tiam ankaŭ denove okazos la somero . . .

## Denove en la „Aktuala Kamerao"

Pri la 72-a Universala Kongreso de Esperanto la amasmedioj de GDR bone raportis. Eble aperis pli ol 50 artikoloj. Menciindas, ke la ĉiutaga novajprogramo de la televida stacio de GDR, la Aktuala Kamerao, en siaj du programoj prezentis filmraporton pri la malfermo de la kongreso. La komento estis tre bona. Sed bedaŭrinde oni denove donis tiun pompan malĝustan informon pri „13 milionoj da esperantistoj" en la mondo. Ĉi-tiu „informo" ne venis de la GDR-delegacio.

## Antaŭ la GDR-UNESCO-Komisiono

La 1-an de oktobro 1987 d-ro Detlev Blanke prelegis pri Esperanto antaŭ membroj de la Sekcio kulturo de la UNESKO-Komisiono de GDR. La prelego celis doni bazajn informojn pri la Internacia Lingvo lige al la rezolucio 23C/11.11. kaj la jubileo.

## Jubileaj prelegoj en Schwerin kaj Rostock

La Distriktaj Estraroj de Kulturligo kaj de la Societo URANIA en Schwerin, kune kun la Esperanto-Asocio organizis jubilean aranĝan en Schwerin, la 18-an de junio 1987. Prelegis la sekretario de GDREA pri „La internacia lingvo Esperanto: 100 jarojn da praktika elproviĝo". La 29-an de septembro d-ro Blanke prelegis en la Wossidlo-Klubo de Kulturligo en Rostock-Schmarl.

## Ekspozicioj jubilee

Dum la jubilea jaro 1987 diversaj bibliotekoj kaj aliaj institucioj organizis ekspoziciojn pri Esperanto.l. a. menciindas tiu dum aŭgusto en la „domo de la instruistoj" en Magdeburg, pri kiu vigle raportis la gazetaro. Ankaŭ en la Saksa Landa Biblioteko, tre fama institucio en Dresdeno, oni organizis ekspozicion pri Esperanto, same en la Universitata Bibliotko de Halle. En la Centra Urbo biblioteko de Berlin dum la tuta septembro funkciis ekspozicio de Esperanto-materialoj kun 10 grandaj vitrinoj kaj 10 informtabuloj. Ankaŭ pri ĝi la gazetaro informis. Estis disradiataj kelkaj radio-intervjuoj. Ni petas la grupojn informi la Centran Estraron pri eventualaj similaj aktivaĵoj.

## Peter Wieland kantis en Esperanto

**La konata kanzonisto en GDR, Peter Wieland, kantis en bonega Esperanto kelkajn konatajn kanzonojn en la kadro de radio-disaŭdigo de radio DDR, la 17-an de oktobro 1987 (Sendung Ohrzeit).**

## Glumarkoj

Haveblaj ĉe Christian Papenmeier (Obere Hauptstr. 104, Oelsnitz 9156) glumarko (ronda, ruĝa) kun la surskribo „Sen paco ne futuro. Ohne Frieden keine Zukunft" kaj jubilea glumarko „Esperanto — die internationale Sprache 1887 — 1987".

## Originala (live)-disaŭdigo pri Esperanto

En la kadro de la tre populara radiodisaŭdigo „Ohrzeit" (orela tempo) de Radio DDR, la 17-an de oktobro 1987 Detlev Blanke estis interparolanto por du horoj pri Esperanto. La programo enhavis 10 malfongajn intervjuojn, kelkajn Esperantajn specimenojn kaj kvizon por la aŭskultantoj (necessis diveni la „Sorĉlernanton" de Goethe en la traduko de Kalocsay). La kulmino eble estis la prezento de kelkaj popularaj germanaj kanzonoj en bonega Esperanto fare de la konata kantisto Peter Wieland. La tradukon faris Manfred Arnold.

## Tagoj de Kulturligo en Aue '87

En la kadro de la „tagoj de Kulturligo" en Aue, distrikto Karl-Marx-Stadt, la vigla grupo organizis la 28-an de majo festkunvenon okaze de la 100-jariĝo de Esperanto. Partoprenis pli ol 30 anoj kaj gastoj. Pri stato kaj perspektivoj de Esperanto kaj pri la 71a UK en Pekino prelegis D. Blanke.

## ITREE 1988

La Internacia Turisma Renkontiĝo de Ercmontaraj Esperantistoj okazos de 1. — 6. 10. 1988 en Antonsthal (ĉe Schwarzenberg, distrikto Karl-Marx-Stadt). La partoprenkotizo por tranoktado, manĝoj, ekskursoj kaj programo estas 200 markoj. Informojn donas Rudolf Eichler, Hermann-Matern-Str. 21, Schwarzenberg, DDR — 9430.

## Arta Semajno '88

Post la sukceso de la Metiejaj Kulturligoj, kiuj okazis ĉijare (1987) februare en la urbo Halle, ni organizos similan aranĝon kun la nomo „Arta Semajno '88" de la 8-a ĝis la 15-a de majo 1988. Ni kalkulas kun ĉ. 150 partoprenontoj.
Por tiu aranĝo ni celas malkovri talentulojn kaj kapabligi interesulojn pri kreado sur la kampo de kulturo kaj arto. Celgrupo estas junaj (kaj mezaĝaj) esperantistoj interesiĝantaj pri plastika arto (ekz. pentrado, litografio, linoleuma gravurado), figura arto (teatro, kabareto, dancado ktp.), muziko, literaturo kaj poezio kaj fotografado. La laborgrupoj havos tre bonajn teknikajn kondiĉojn en du junularaj klubejoj kaj en la profesia Centro por Plastika Arto. Vespere okazos interesaj kulturaj programoj. Dum unu tago estos tuttaga ekskurso al Naumburg kaj Freyburg. Kulmino de la aranĝo estos la publika prezentado de la plej bonaj rezultoj de la unuopaj laborgrupoj.
Informiloj por la aranĝo peteblos ĉe: Kulturbund der DDR, Bezirksvorstand Esperanto, PSF 161, Halle, 4010.

## „Klock 8 achtern Strom"

Tio signifas „je la oka malantaŭ la rivero" kaj estas ŝatata revua programo en la televido de GDR. Tiu programo havis sian 100an sendaĵon la 13an de junio 1987. Dum la programo oni ankaŭ menciis la 100-jaran Esperanton kaj anoncis kanttitolon en la lingvo.

## Distrikta renkontiĝo en Karl-Marx-Stadt

La 24-an de oktobro 1987 la esperantistoj de la distrikto Karl-Marx-Stadt okazigis sian laŭvican distriktan renkontiĝon. Prelegis d-ro Detlev Blanke.

## Georgi Korotkevič en Berlin

Kiel gasto de la prezidio de Kulturligo la konata esperantisto, membro de la prezidantaro de ASE, Georgi Korotkevič, restadis en Berlin dum oktobro 1987. Li apartenis al grupo de iamaj sovetiaj kulturoficiroj, kiuj okaze de la 70-a datreveno de la Oktobra Revolucio vizitis GDR.

## La prezidanto de PEA en Berlin

Laŭ invito de la Pola Kulturcentro en Berlin kaj de GDREA la prezidanto de Pola Esperanto-Asocio, la konata jurnalisto Roman Dobrzýnski restadis de 19-a ĝis 21-a oktobro 1987 en Berlin.
Roman Dobrzýnski prezentis en la centro antaŭ esperantistoj de Berlin sian filmon „Esperanto", kiu jam tre sukcese estis videbla kadre de la 72-a UK.

## Aŭskultu la Esperanto-programojn de Radio Polonia

Radio Polonia disaŭdigas ĉiutage 6 programojn en Esperanto. Jen la senlaca redakcio. De maldekstre dekstren: Andrzej Pettyn (direktoro de la redakcio), Bárbara Pietrzak (redaktorino), Gabriel Brzerziński (reĝisoro), Anna Henn (parolistino), Jerzy Uspienski (redaktoro), Milada Szweda (vicdirektorino), Jan Klimek (redaktoro).
Petu informilojn de: Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, Al. Niedpodległości 77/85, PL-00-950-Warszawa, Pollando.

## William Gilbert — 75jara

Mi konatiĝis kun William Gilbert dum la jaro 1965, koresponde, kiam li sendis al mi sian libreton „Planlingvaj problemoj" (La Laguna: Stafeto, 1962). Ekde tiam ni daŭre havis kontakton. La menciita libreto por mi fariĝis unu el la plej klare skribitaj studoj pri la naturalisma-skemisma tendencoj en la planlingvoj. Ne mirige, Gilbert estis dum la 30-aj jaroj aktiva Interlingue-ano, eĉ senatano de Interlingue, kaj dum la 50-aj jaroj revenis al Esperanto. Pri siaj spertoj lingve praktikaj temas al libreto. Poste la nomo William Gilbert konatiĝis aparte en la esperantista pacmovado. Li havis kaj havas gravajn funkciojn en Mondpaca Esperantista Movado, estis ties Ĝenerala Sekretario kaj nun ĝia Vicperzidanto. Dum multaj jaroj Gilbert estis la ĉefredaktoro de „Paco", kaj mi havis la agrablan eblecon kunlabori kun li. Foje li ankaŭ vizitis nian landon por partopreni internacian pacarangon. Kiel alta funkciulo de MEM William Gilbert elektiĝis en la Mondan Packonsilantaron. Malgraŭ la granda okupiteco lige al la agado de MEM, William Gilbert ne ĉesis okupiĝi pri lingvaj demandoj, aparte li publikigis pri la problemo de propraj nomoj. Li estas tre modesta kaj agrabla homo, ne ŝatas grandajn paroladojn, sed agadas multefike. Mi ĉiam estis surprizita pri lia granda esperantologia scio — kion li kutime neas. Ekde kelkaj jaroj William Gilbert ankaŭ estas la prezidanto de la tradicio-riĉa franca organizajo „Fédération Espérantiste du Travail". Se oni iam demandas min pri tiuj esperantistoj, kiuj plej influis mian evoluon, mi ankaŭ mencius mian amikon el Francio.

Kiel omaĝi plej bone al la jubileulo, kiu fariĝis 75-jara la 16-an de julio 1987? Eble prezentante malgrandan bibliografion de liaj interlingvistikaj kaj esperantologiaj studoj? Jen:


Gilbert, William (1962): Planlingvaj problemoj: La Laguna: Stafeto, 99 p.

— (1969): Pri geografiaj nomoj en Esperanto. En Nuntempa Bulgario, n-ro 11, aldonaĵo, p. 2

— (1971): Problems of Languages planned for international use. (Rawfordsville)

— (1977a): Esperanto servu al paco. En: D. Blanke (1977, Red.): Esperanto-lingvo — movado — instruado. Berlin: Kulturbund, p. 111 — 117

— (1977b): Pri landnomoj en Esperanto. En: Paco, GDR-eldono, Berlin, p. 21

— (1977c): Pri propraj nomoj en Esperanto. En: Paco, n-ro 4, p. 8 — 9

— (1977d): Planlingvaj problemoj. Kopenhago: Kehlet-Stafeto. 2-a eldono, 99 p.

— (1981): Landnomoj en Esperanto — problemo nepre solvebla. En: Filologo, n-ro 19 (junio), p. 1 — 5

— (1984): Sur la vojo al la naskiĝo de MEM. En: der esperantist, **20**, n-ro 126 (4/1984), p. 77 — 79

— (1985): Pri landnomoj en Esperanto. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 12 p.


**Detlev Blanke**

## Gratulojn al Ilse Serowy: 75jara

La longjara kunlaborintino de la sekretariejo de GDREA, s-ino Ilse Serowy, festis sian 75-an naskiĝtagon, la 19-an de oktobro 1987. Ni kore gratulas.

**CE GDREA**

## Ni kore gratulas al

— Lieselotte Habicht, kiu festis sian 75-an naskiĝtagon en Waltershausen

— d-rino Sabine Fiedler el Lepzig pro la distingo per la Johannes-R.-Becher-Medalo en bronzo, kiun ŝi ricevis la 17-an de septembro 1987

— Otto Möller el Heiligenstadt, kiu festis la 18-an de novembro 1987 sian 80-an naskiĝtagon

— Werner Pfennig el Neubrandenburg, membro de la prezidio de GDREA, kiu estis distingita per la Honora Insigno de Kulturligo en arĝento

— Brundhilde Stief el Neustrelitz, kiu estis distingita per la Honora Insigno de Kulturligo en bronzo

— al d-ro Till Dahlenburg, kiu ricevis la 1an de majo la Oran Honorpinglon de la Nacia Fronto.

## Richard Partecke 1923 — 1987

Forpasis la 21-an de aŭgusto 1987 la iama membro de la Centra Estraro, Richard Partecke el Eisenach. Li estis la prezidanto de las scienc-teknika komisiono de GDREA kaj akiris estimon i. a. pro multaj fakprelegoj en- kaj eksterlande. Pro malsaniĝo li ne rekandidatiĝis por la nova estraro de GDREA. Ni konservos al li honoran memoron.

**Centra Estraro de GDREA**

## Ni funebras pro la forpaso

— de Hugo Fuchs, kiu mortis la 13-an de majo 1987 en abarz estis aktiva membro de LEA

## Por ekspozicio en Voljskij

Esperanto-klubo „Samideanoj" organizos ekspozicion de insignoj kaj esperantaĵoj. Ni petas E-klubojn kaj esperantistojn partopreni en preparigo de la ekspozicio. Ni ege petas alsendi insignojn (laŭ la temoj: pri via lando; pri via urbo; Esperanto; paco; sporto; estrado; libero tempo) kaj diversajn esperantaĵojn.
Niaflanke ni certigas vin, ke ĉiuj alsendintaj insignojn por ekspozicio ricevos ekvivalenton: insignojn, kolektojn de bildkartoj, librojn, ktp. Ni ankaŭ povas sendi al vi insignojn kaj poŝtmarkojn. Tiuj insignoj beligos kolektojn de insignoj kaj kolektojn de poŝtmarkoj.
Turnu vin al: Bondarj Aleksandro, str. Olomouckaja, 72—34, SU—404131, Voljskij, Volgograda regiono, Sovetunio.

**Die auf der Umschlagseite abgebildete Sonderbriefmarke der DDR zum 100jährigen Jubiläum des Esperanto wurde am 7. 7. 1987 herausgegeben. Gleichzeitig erschien der hier abgebildete Sonderstempel. Die Sondermarke (ein Block zu 0,85 M) ist beim Esperanto-Verband im Kulturbund der DDR (Otto-Nuschke-Str. 1, Berlin, 1080) erhältlich.**

## MUZEO DE PACO KAJ SOLIDARECO EN SAMARKANDO

Laŭ iniciato de lokaj E-aktivuloj en Samarkando fondiĝis Muzeo de Paco kaj Solidareco. En la Muzeo, situanta en la urbocentro, estas eksponataj diversspecaj pacpropagandiloj el pli ol 40 landoj de ĉiuj kontinentoj. La organizantoj de la unika Muzeo konstante kolektas ĉiulandajn kaj ĉiulingvajn afiŝojn, sloganojn, pentraĵojn, infandesegnaĵojn, fotojn, insignojn, gluetikedojn, librojn, revuojn, lumbildojn, T-ĉemizojn, balonojn kaj ĉiujn ceterajn materialojn pri batalo de la popoloj kontraŭ militarismo, faŝismo, rasismo, novkoloniismo, por la paco, socia justeco kaj progreso. La Muzeo ankaŭ tre volonte akceptas dokumentojn kaj rememorojn de veteranoj-kontraŭfaŝistoj, leterojn de diverslandaj pacbatalantoj. Tiuteme oni korespondas en Esperanto, la angla, rusa, uzbeka, laŭbezone ankaŭ en aliaj lingvoj.

Bonvolu direkti ĉiujn kontribuaĵojn al:

Museum of Peace and Solidarity
c/o International Friendship Club
„Esperanto"
P.O. Box 76
703000 Samarkand, Uzbekistan, USSR.

Ĉiulandaj E-aktivuloj estas petataj subteni la iniciaton de samarkandaj esperantistoj, disvastigi ĉi-tekston pri la Muzeo de Paco en la landaj porpacaj medioj, laŭeble aperigi ĝin en nacilingvaj periodaĵoj.

Anticipajn dankojn al ĉiuj helpontoj!

## 205-jara institucio — gvidanto esperantista

Ekde la 1-a de julio 1987 Prof. Dr. Ottó Haszpra, estrarano de UEA pri natursciencaj kaj teknikaj aferoj estas la direktoro de la Instituto pri Akvoinĝenierio de la Budapeŝta Teknika Universitato. La instituto konsistas el tri katedroj (Akvomastruma, Akvokonstrua kaj Akvoproviza) kaj la ilin servantaj laboratorioj kaj provinca ekzerca stacio. La instituto fakte kultivas unu el la plej delonge senĉesinterrompe ekzistantan branĉon de la inĝeniero-edukado en Hungario. Nome, en la jaro 1782 fondiĝis en la urbo Pest (parto de la nuna Budapeŝto) la tielnomata Institum Geometricum et Hydrotechnicum (instituto de termezurado kaj akvokonstruado), kiu estas la jura antaŭulo de la Budapeŝta Teknika Universitato, sed evidente plej rekte ankaŭ de la nuna Instituto pri Akvoinĝenierio.
La Instituto plenumas ne nur instruojn-edukajn taskojn, sed estas bone konata ankaŭ pro sia teoria kaj praktika esploragado, per kiu ĝi kontribuas kaj al la evoluo de la inĝenieraj sciencoj kaj al la solvo de praktikaj problemoj estiĝantaj konekse kun diversaj akvorilataj projektoj hejmlandaj kaj alilandaj.

Estas notinde, kvankam Prof. Haszpra samtempe estas estro de la anglalingva inĝeniero-edukado (estigita ĉefe por alilandaj studentoj) ĉe sia fakultato, ke li tamen jam de preskaŭ 30 jaroj senĉese agadas por la aplikado de Esperanto en la sciencoj kaj tekniko.

## OFICIALAJ INFORMOJ DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO

**(Sendepende lingvo-instituto fondita de D-ro L. L. Zamenhof en 1905)**

**Post studo kaj propono de la Garmatika Sekcio la Akademio voĉdone akceptis jenan rezolucion:**

1. **Post ita/ata/ota- vorto, la aganto estas indikita per DE. Ekz. ŝi estas amata de ĉiuj (6-a Regulo de la Fundamenta Gramatiko).**

2. **Post o-vortoj, DE povas indiki la aganton, se neniu alia koncernanto estas ebla. Ekz., la kanto de la birdoj, la projekto de la inĝenieroj (Fundamento), la parolado de la oratoro k. s.**

3. **Por indiki la aganton post o-vortoj en aliaj kazoj, la plej ĝenerale akceptita formo estas FARE DE. Ekz. la akcepto de kongresanoj fare de la urbestro; la traduko de Hamleto fare de Zamenhof.**

**La Direktoro de la Sekcio pri Gramatiko**
**Michel Duc Goninaz**

**La prezidanto,**
**D-ro A. Albault**
**(21 rue de Verfeil,**
**F — 32100 Toulouse,**
**Francio)**

## GDR

20j. komencantino dez. kor. tutmonde: Heike Schönfelder, Leninallee 51, **Potsdam 1570**
16j. lernantino dez. kor. tutmonde pri literaturo: Verena Bergner, Buschower Weg 75, **Staaken 1546**
23j. elektristo dez. kor. p. ĉ. t.: Thomas Raabe, Nennhauser Damm 113, **Staaken 1546**
Junulino dez. kor. tutmonde pri E-movado, lingvoj, muziko, turismo, kol. bk: Helga Thomas, Hauptstr. 35, **Wolsier 1831**
Komencantino, 52j., dez. kor. tutmonde pri vojaĝoj, E-movado, naturo, homoj: Leonore Knöfel, Oswald-Rentzsch-Str. 23, **Dresden 8010**
Pedagogino, 60j. em. dez. kor. tutmonde pri vojaĝoj, literaturo, E-movado: Gertrud Malsch, Am Drachenberg 7, **Meiningen 6100**
35j. inĝenier-ekonomistino dez. kor. tutmonde pri vivkutimoj, migrado, kol. bk, bildlibrojn, suvenirojn: Eveline Hoffmann, Vetterstr. 21, **Karl-Marx-Stadt 9022**
Heidlinde Schulze, H.-Beimler-Str. 20, **Coswig 8270,** dez. kor. tutmonde pri vojaĝoj, migrado, E-movado
Instruisto, 63j., ofertas ĉambron por eksterlandaj geesperantistoj dum junio kaj julio. Antaŭa korespondado necesas. Gerhard Hornbogen, Am Schönblick 11/31, **Weimar 5300**
M. Krüger, Leninallee 10, **Berlin 1017,** dez. kor. tutmonde pri arto, lingvoj kaj sporto
Pensiulo, 58j., dez. kor. kun s-anoj en soc. landoj pri sociaj temoj, ĝardenoj, hundoj, fotografado, kol. pm: Kurt Nobst, Mittelweg, **Blumberg 1291**
Matthias Reimann, Platz der Freiheit 20, **Ellrich 5503,** serĉas malnovajn E-gazetojn, prec. „der esperantist" k. a. ankaŭ E-librojn kaj E-filatelo

## Soveta Unio

Geesperantistoj (19 — 45j) el Sovetunio, urbo **Ĥarkov** dez. kor. kun ĉl pri ĉt,

kolektas PM kaj BK.

— Svetlana Leonova (27j)-pr. 50 let SSSR, **SU—310128, Ĥarkov—128** (inĝenierino)
— Leonid Kovtun (29j), filologo, gvidas E-rondon P. K. 2404, **Ĥarkov—1, SU—31001**
— Viktoria Beljaeva (20j)-pr. Gagarina, 82-42, **SU—310140, Ĥarkov—140** (gvidantino de dramteatro)
— Sergeo Zaika (35j), inĝeniero, gvidas E-rondon, P. K. 1908, **Ĥarkov—142, SU—310142**
— Lilia Vaničkina (22j), studentino, str. Tankopja, 34—18, **SU—310100, Ĥarkov—100.**
— Irina Ninko (22j), studentino, str. Tankopja, 34—44, **SU—310100, Ĥarkov—100.**
— Nataŝa Kovalevskaja (21j), muzikistino, pr. Gerojev Stalingrada, 181—220, **SU—310096, Ĥarkov—96**
— Nikolao Fomenko (51j), ĝardenisto, str. Iniciativnaja, 6—77, **SU—310177, Ĥarkov—177.**
— Irena Kuznecova (22j)-str. Njutona, 123—60, **SU—310162, Ĥarkov—162.**
— Vera Zabolozkaja (29j), kemiistino, str. Kotlova, 67—4, **SU—310052, Ĥarkov—52.**
— Elena Rijjenko (20j), laboristino, Stadionnij projezd, 8/5—28, **SU—310091, Ĥarkov—91.**
— Leonido Fesenko (25j), studento, str. Puŝkinska, 79/5, **SU—310063, Ĥarkov—63.**
— Larisa Fartusova (25j), bibliotekistino, str. Gvardejcev Sironincev, 39-a, kv. 928, **SU—310170, Ĥarkov—170.**
— Sergeo Romanov (22j), studento de kemia fako, pr. Gerojev Stalingrada, 187—135, **SU—310096, Ĥarkov—96.**
— Alina Sljaĥova (34j), ul. Kalinina, 11 u. Gotvald, **Ĥarkova regiono, SU—313720,** instruistino de angla lingvo.
— Nikolao Karpenko (70j), pensiulo, gvidas E-kurson str. Trinklera, 20—43, **SU—310022, Ĥarkov—22.**

Herausgeber: Kulturbund der DDR
Redaktion: Otto-Nuschke-Str. 1, Berlin, 1080
Fernruf: 2 82 63 43
Verantw. Redakteur: Dr. sc. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Joachim Schulze. —
Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. —
Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckerei Aue, 9400 Aue,
Artikel-Nr. (EDV) 7928 3 2 16